

250–299 paŝoj – 54 baladoj

& Estas mi esperantisto:	130	& La nobla arto:	162
& Pluvaj ferioj ĉe l' mara bordo:	131	& Se estus ĉi tie:.....	164
& Vana espero:	132	& Infanoj ĉe montrofenestro: .	165
& La enamiĝinta leono:	133	& Vintra fabelo:	167
& Du korvoj:.....	134	& Deveno de la virino:.....	169
& Mi iris al la haven':	135	& Ĥolera kanto:.....	170
& Sabaton vespere:.....	136	& Ministro-filistro:.....	171
& Laŭdkanto al la brando:	137	& Sic transit gloria mundi!:....	173
& Testamento:	138	& Azena ruzo:	175
& Bal...ado:.....	139	& La muso kaj la rano:.....	176
& Idilio:	141	& La oreloj de la leporo:	177
& Joe Hill:	142	& La spuroj:	178
& La leporo kaj la testudo:	143	& Mian vazon se mi mortos:..	180
& Ne okazas duaj fojoj:.....	144	& Konvena ĉapelo:.....	181
& Balado pri ulo:	145	& La ĝojoj de ekskurso:	182
& Istedzinoj ĉiaj:	146	& Vi resaniĝis!:	183
& La Amo de la Fiŝkaptisto: ..	147	& Knabino sveda estis:.....	185
& Averta:	148	& Apologio de La Fontaine: ..	186
& Viro de mia revo:.....	150	& Entombigo:.....	187
& Bona negoco:	151	& Epigramoj:.....	189
& La blondulino:	152	& La serĉanto de perdita spado:	191
& Sanga nokto aŭ venĝo de Amoro:.....	153	& La vulpo kaj la kapro:	192
& Ho malamik':	154	& Laŭ vidpunkto de heliko: ...	194
& Sven en Rozĝarden':	155	& Libertempo:.....	196
& La borso gvidas:	156	& Mia lingvo:.....	198
& Al mizantropoj:.....	158	& Mia penso:.....	200
& Faŝismo:.....	160	& Sezonoj:.....	201

& Estas mi esperantisto:

< Ripete 13 sed rekante 9 el 25 batoj por strofo, entute 250 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Julio Baghy. Baladigis Martin Strid (2016) per ŝotisa melodio sveda.>

(#Melodio:

<:25> (/dodo do3re doTi TiSo; rere so3fa mido dodo; LaLa do3La LaSo SoSo; So3So Ti3re redo dodo <[la:mi]> mi3re mi3re doLa SoMi; So3So Tire redo do do <[So.do]>)×10)+

(& Strofoj:

'1 Verda stelo sur la brusto ;
iom palas pro la rusto. (; Mi
ne estas purigisto (×:; **estas mi
esperantisto.**))×

'2 Kuŝas ie sub tegmento ;
"Netuŝebla Fundamento". ;
Tuŝu ĝin nur la Mefisto

'3 Polvkovrite sur bretaro ;
putras mia SAT-vortaro. ;
Tedas min la vorto-listo

'4 Gramatikon mi ne konas ;
kaj gazeton ne abonas... ;
Librojn legu la verkisto

'5 Mi parolas kun rapido ;
"Bonan tagon! Ĝis revido!" ;
Ĝi sufiĉas por ekzisto;

'6 Pionirojn mi kritikas, ; la
gvidantojn dorne pikas ; kaj
konspiras kun persisto

'7 Por la venko mi esperas, ;
sed neniom mi oferas. ; Mi ne
estas ja bankisto

'8 Se baraktas en la krizo ; la
movado, organizo, ; helpas mi
nur per rezisto

'9 Flugas per facila vento ; el
la buŝo Nova Sento. ; Ĝi
sufiĉas por sofisto

'10 Post la mort' ĉe tombo mia
; staros "rondo familia", ;
nekrologos ĵurnalisto: ; **estis li
esperantisto.**)

& Pluvaj ferioj ĉe l' mara bordo:

< Rekante 13 el 25 batoj por strofo, entute 250 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo kaj disduigo na strofoj. Klarigo (*): '5 Monunuo, francavro.>

(#Melodio:

<:25> (/so laso fami; mi fami redo; so laso fami; mi redo mi;
(#Rekantaĵe: re remi fare mire domi reTi do; so miso fami fa re
mi)
)×10)+

(&Strofoj:

'1 /Ventego blovas, ; Ĝi
nubojn ŝovas ; Kaj ondojn
movas ; ĉe mara bord',

(×:; **Dance nun tretu kaj
ripetu vortojn ĉi ; kaj la
rakonton aŭdos ni.**)

'2 Mi dumferie ; Nun sidas tie.
; Atendas pie ; Sub mia
pord'... ..

'3 Dum pluvo bruas ; Kaj
vento skuas ; Mi malenuas ;
Kun vinbotel',

'4 Kaj ĝojas vere ; Pri la
vetero ; Nur la kelnero ; De la
hotel'.

'5 En lit' mi restas, ; Glacie
frostas, ; Kaj tio kostas ; Dek
frankojn* pli!

'6 Vi min ĵaluzas ; Kaj eĉ
akuzas, ; Ke mi amuzas ; Min
tie ĉi!

'7 Ho, mi atestas, ; Feliĉa estas
; Nur kiu restas ; En sia dom' ;
.....

'8 Mi vin envias; Kaj vi ne
scias, ; Ke VI ferias, ; Vi stulta
hom'!

'9 Dum pluvo bruas ; Kaj
vento skuas ; Senhalte fluas ;
Nun nazkatar'... ..

'10 Maro, adiaŭ! ; Prenos
hodiaŭ ; Min ĉe l' stacio ; La
vagonar'!

& Vana espero:

< Ripete 16 sed rekante 8 el 25 batoj por strofo, entute 250 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Marie Hankel (Sableroj, Leipzig 1911). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:25> (o;So /do dore do Ti;La So FaMi Re Mi i;So do dore do Ti;La So FaMi Re Mi;Re Do oRe Mi iRe Do TI Do)×10)+

(&Strofoj:

'1 (So/mero alvenis, ; Per floroj nin benis,)×

(×:; **antaŭen iru kun dezir'**.)

'2 Varmega la tero ; Kaj viva l' espero!

'3 Nun ridas la suno ; Al ni de l' aŭtuno - -

'4 Sed ĉiel nur ploroj, ; Malgajaj la koroj!

'5 Ho, kial vi plendas? ; Ni fruktojn atendas,

'6 Sed nuda la tero - - ; Kaj vana l' espero!

(Tamen!)

'7 Laboro senlaca, ; Persista kaj paca,

'8 Kvazaŭ nur prove ; Penadas denove

'9 Kun timo kaj tremo, ; Per diligentemo.

'10 Proksiman la jaron ; Ni trovos fruktaron!

& La enamiĝinta leono:

< Rekante 11 el 23 batoj por strofo, entute 253 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:23> (a;Mi /LaLa TiTi dore mido Ti Ti;Mi rere TiTi dodo LaSi Ti Ti;

(#Rekantaĵe: La Ti dore mido Ti; rere TiTi doododo LaSi La)

)×11)+

(&Strofoj:

'1 Kna/binon amis la leon'
freneze, ; sin svatis ĉe la patro.
Lin kompleze

(×:; **Enamiĝis la leon'** ;
provis esti milda por ŝia
bon'.)

'2 akceptis tiu, sen plej eta
ŝajno ; de rifuzem', kaj diris:
"Granda gajno

'3 estus por ĉiu havi vin
parenco, ; min plezurigas via
nupt-intenco.

'4 Mi donas ŝin al vi kun ĝoja
preto, ; sendube ... jes ... sed
mia filineto

'5 estas knabin' de delikataj
sentoj ... ; timema ... nu ... kaj
viaj ungoj, dentoj!

'6 Ne miru, ke ŝi tremas de vi.
Sveno ; ŝin kaptus ja ĉe via
ĉirkaŭpreno.

'7 Mi petas do, se vi ŝin amas
vere, ; svatiĝi venu pli
mildmaniere."

'9 Tuj la leon' amarda
hejmeniris, ; la ungojn tondis,
dentojn li eltiris,

'10 kaj rerapidis al la dom'
bopatra. ; Sed tie — stango,
pugno, ŝtono akra

'11 atendis la senarman, kaj lin
frapis, ; ĝis, duonmorta, pene
li eskapis.)

& Du korvoj:

<Rekante 16 el 32 batoj por strofo, entute 256 paŝoj dum 3 minutoj. Poemon verkis Aleksandr Puŝkin (1828). Tradukis Ivan Lubjanovskij (2000). Baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo tradukita el islanda de Ólavur Riddararós, disduigante la strofojn.>

(#Melodio:

<2,3:32> (

/mi mi mi mi so solfa mi i; soso sofa mi i; mi mi re re mi milre do
lTi; LaTi dore mimi mire; dodo dore mi mire do Ti do o

)×8)

(&Strofoj:

'1 /Korv' al korvo fluga2s kaj
(×:; – **Karbo kaj forĝist'** – ;)

Ĝin demandas en ma2lga2j':

(×:; **Junaj viroj, viglaj viroj!**
; Iru plankon, dancu kun
granda em'!)

'2 "Kion ni tagmanĝi povus?
..... Kie manĝon ian trovus?
.....

'3 Korv' al korvo: "Scias mi,
..... Kie manĝon trovos ni:

'4 Kavalir' sub alta arbo
Kuŝas morta, kiel garbo.

'5 Kiu, kial murdis lin,
Scias lia ĉevalin',

'6 Lia falko kaj ankoraŭ
Nur edzino lia kora.

'7 Sed la falko forrapidis,
La rival' ĉevalon bridis,

'8 La edzin' atendas iun –
Ne l' mortintan, la alian".

& Mi iris al la haven':

< Ripete 23 sed rekante 19 el 32 batoj por strofo, entute 256 paŝoj dum 3 minutoj. Norda Kantaro #4688. Sveda popolkanto. Tradukis nekonato.>

(#Melodio:

<1,1:2> (

So /mi3mi rere /do3do re;mi /fa3mi redo /re Soo;hSo /reehSo
reehSo /re Dnso /mi re /do oo;hso /soohSo Soohso /soohSo
Soo;hso /la3so fa3mi /so3lfa fa;mi /mire reTi /So fa /mi re3lido /do
)×8)+

(&Strofoj:

'1 Mi /iris al la /ha2ven' ; por
/trovi ŝipo/ficon ; O /ja, o ja, o
/ja, o /kia /tag'! ; Ha/lo' hura',
ha/lo' hura'! ; por /trovi
ŝipo/fi2con ; O /ja, o ja, o /ja,
o /kia2 /tag'!

'2 Demandis tiam kapitan' (× ;
"Ĉu vi direkti povas?"

(×.; **O ja, o ja, o ja, o kia
tag'!**) '1 (×.; **Halo' hura',
halo' hura'!**))

'3 La ŝipo estis bona ŝip' ; la
nomo estis "Lulo"

'4 Tre bona estis kapitan' ; ĉar
li regalis brandon

'5 Sed tiam en hispana golf' ;
okazis en tagmezo

'6 Alnaĝis tie stranga fiŝ' ; ĝi
ŝajnis tutfreneza

'7 Ni portis fiŝon al haven' ; ĝi
paŝtu niajn porkojn

'8 En Hispanujo trinkis ni ; kaj
kisis belulinojn

& Sabaton vespere:

< Ripete 16 el 32 batoj por strofo, entute 256 paŝoj dum 3 minutoj. Norda Kantaro #4876. El dana tradukis >

(#Melodio:

<1,2:2> ((h;So /dodo SoSo /mi domi /reTi SoTi /do)×

h;mi /mimi somi /rere soohre /dodo lala /so o2h;fa3 /mimi somi /mire faahre /doTi LaTi /do)×8)+

(&Strofoj:

'1 (Sabate mi vespere atendis longe vin ;)× (Promeson vian pri vizit', vi ne plenumis ĝin ;)×

'2 (Sur lito mi ekkuŝis, amaris mia plor' ;)× (Kaj kiam pordo movis sin, eksaltis mia kor' ;)×

'3 (Dimanĉe mi leviĝis, hararon plektis ĉar ;)× (preĝejon iri volis mi, al korto de l' tombar' ;)×

'4 (Sed tie vi forestis, preĝeje mankis vi ;)× (forĝesis certe min kaj nun alian amas pli ;)×

'5 (Revenis hejmen sola de l' templo ĝis la farm' ;)× (En ĉiun spuron sur la voj' de mi ekgutis larm' ;)×

'6 (Rubando ruĝe bela ne plu ornamas min ;)× (Ne decas via amdonac' al mia mortinklin' ;)×

'7 (Ĉu eblas pluki rozojn sur bed' sen ĉia flor'?)× (Ĉu eblas trovi amon do en jam senama kor'?)×

'8 (Mi volis pluki rozojn, ne plu kolektas mi ;)× (El mia vin aminta kor' jam fuĝis la pasi' ;)×)

& Laŭdkanto al la brando:

< Rekante 27 el 43 batoj por strofo, entute 258 paŝoj dum 3 minutoj. Norda Kantaro #5151. El sveda tradukis Kukoletto (1993) kaj verkis kroman strofon ('6).>

(#Melodio:

<:43> (/SoSo dodo LaLa fa; miidodo reTi doodore mido; SoSo dodo LaLa fa; miidodo reedoTi dodo do3;do Ti3do rere redo mi Ti3do rere redo mi; So do La fa; mido reedoTi dodo do; soososo mido laalala so; soososo mido laalala so; so Ti3Ti do3;do)×6)+

(&Strofoj:

'1 En /jar' mil sepcent sepdek sep

(×:; **kantu fa la kaj cantu fa lala ;)**

drinke estis tuta sek'

(×:; **hej cantu hop falerala lej ;)**

En jar' mil sepcent sepdek ok: senmodera brandostok'

(×:; **Brandon, brandon ; bonan tason da klara brand' ; Ĉu adelita, ĉu ade lej ; Ĉu adelita, ĉu ade lej ; Ĉu ade lej.**)

'2 Forĝist' staranta ĉe la fajr' lia estos brandsalajr'

Jes, ĉar nigras li pro fulgo, pindon donu sen indulgo

'3 Muelist' ĉe muelil' havu likvon el distil' Jes, ĉar blankas li farune ; litron donu oportune

'4 Ŝuisto ĉe la botoŝtip' sentu brandon sur la lip' Jes, ĉar li la ŝtipon uzas, lin ni drinkon ne rifuzas

'5 Kudristo kun kudril', faden' havu brandon ĝis la plen' Jes, ĉar li kudrilon uzas, lin ni drinkon ne rifuzas

'6 Ĉiuj uloj en vilaĝ' hurau pro la avantaĝ' Jen sufiĉa estas brando, nun feliĉas tuta lando

& Testamento:

< Rekante 21 el 43 batoj por strofo, entute 258 paŝoj dum 3 minutoj. Poemon verkis Emba. Baladigis Martin Strid (2015) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:43> (/So dodo SoSo LaSo FaaMi;Mi SoSo LaLa LaTi do do;So dodo SoSo LaSo FaaMi;Mi LaLa SoFa LaSo FaMi; SooSoSo LaSo SoTi dodo;

(#Rekantaĵe: dodo mimi re La3;La TiTi rere do So; doododo SoSo Ti La;La SoSo LaSo Fa Mi; So LaTi re do o))×6)+

(&Strofoj:

'1 /Ekfebris pens': la tero tuta ;
pereos per atom-ekstermo! ;
En ĉi pereo absoluta ; la
mondo estos do kaputa ; kune
kun mi, la eta vermo.

(×:; **Jen la testamento ; de
nuna nia gento: ; Tuja pereo
tuta ; en morto absoluta. ;
Ĉu resti muta? .)**

'2 Mondkataklismo min
forviŝos, ; ne aĉa krev' en orfa
solo. ; Ŝtiparo mia vere riĉos, ;
se la homaro kunbruliĝos. ; Ĉu
estas do pli da konsolo?

'3 Konsolo? Ho ne! Fia vanto!
; Skorio de anim' ribela! ; Mi
diru en ĉi tiu kanto, ; eble la
lasta, de mortanto, ; ke l' vivo
estas tamen bela!

'4 Al vi mi diras, hom'! Ne
lasu ; perej la homvivo
varman, ; leviĝu, ĉiuj, kaj
amasu, ; kaj krii, hurlo kaj
frakasu ; la frenezumon atom-
arman!

'5 Tial la Hom' do iĝis granda,
; kapabla eĉ por
mondrenverso, ; ke uze de ĉi
pov' giganta ; li mem elmortu,
memmurdanta, ; por
mokrideg' de l' Universo?

'6 Ne! Venku la pli homa
homo! ; En tiu sento orakola, ;
ke li sen funga mondfantomo,
; sen mensa diseriĝ-simptomo
; plezuros pri la viv-aromo, ;
mi feliĉege mortos sola.)

& Bal...ado:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 259 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butiko, 1931). Baladigis Martin Strid (2017) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por Balado pri maltima formiko. Klarigoj (*): '4 Charleston, moda danco ekde 1923. '7 Danzig, germana nomo de pola urbo Gdansk.>

(#Melodio:

<:37> (/mimi dodo mimi dodo; SoSo rere fafa re; SoSo rere fafa rere; SoSo dodo mimi do;

(#Rekantaĵe: dodo fafa lala fafa; dodo mimi soso mi; rere fafa rere; SoSo mimi soso mi; re emi fare Tire do o;)

)×7)+

(&Strofoj:

,& Unua:

'1 /Ho jarcento de l' sensenco,
; Fina fino de romanco! ;
Ĉirkaŭ ni nur dekadenco; Aŭ
almenaŭ... peka danco!

(×:; **Dancu per la ses piedoj ;
Dancu paŝon post la paŝ' ;
Ĉiun paŝon kredu ; kaj ne
metu ĝin en maŝ' ; Dancu
paŝon post la paŝ'.**)

'2 Certe ankaŭ praepoke ; Jen
kaj jen okazis baloj, ; Sed
hodiaŭ ĉiuloke; Baloj estas...
kanibaloj!

'3 Ĉar kapablas nur la negroj ;
Torde – kvazaŭ pro koliko –
Moki dum deliraj febroj ;
Leĝojn de la... balistiko!

,& Dua:

'4 Senkomprene saĝa homo ;
Miras pri la "ĉarlestonoj", ;
Kvankam li (aŭ lia domo) ;
Havas multe da bal-konoj!

,& Tria:

'5 Nun laŭ takt' aŭ
kontraŭtakto ; Komenciĝas la
fokstroto, ; Kaj sen "takto"
(pro l' kontakto) ; Ĝi finiĝas
per... koksfroto!

'6 Pli ol la fabel-cikado ;
Junulin' laŭ nuna stilo ; Zorgas
pri la mastrumado: ; Ŝi ja
estas... bala ilo!

,& Kvara:

'7 Kaj vi mem, amiko, ĝuis ;
La dancarton de l' progreso, ;
Se vi ankaŭ rendevuis ; Ĉe... l'
Danciga* Mondkongreso!

& Idilio:

< Rekante 19 el 37 batoj por strofo, entute 259 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Julio Baghy (Preter la vivo, Budapeŝt 1923). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:37> (/mi mido mimi reTi reere;re doLa dodo TiLa Ti i;mi mido mimi reTi reere;re doLa dodo TiSi La;

(#Rekantaĵe: mi mido mimi reTi reere;re doLa dodo TiLa Ti Ti;mi mido mimi reTi ree;rere doLa dodo TiSi Ti La)

)×7)+

(&Strofoj:

'1 /Gardisto cara sub fenestro ;
postenon staras kun fier'. ; Li
sin imagas la regnestro: ;
despot' kruela de l' karcer'.

(×:; **Hazardo naskon regas
nian ; Humilu do pri via
sorto ; Nur unu fojon vivas
mi, ; Mi feliĉu do ĝis mia
morto.)**

'2 Karcera ĉambro de l'
taĉmento, ; ŝlosita pord'
katenas min. ; En orfa solo de
l' silento ; mi pensas pri la
disciplin'.

'3 Sur la fenestro, vid' al vido,
; subite sonas brua frap' ; kaj
logas min per ĉarma rido ;
knabino kun orbukla kap'.

'4 Graciaj manoj voke gestas ;
kaj mi la kisojn sendas for. ;
Kortuŝan ĝojon mute festas ;
en la karcerero - mia kor'.

'5 En tuta lando el regatoj ; la
plej valora estas ŝi. ; Ŝi havas
koron por kompatato ; kaj
larmojn por la emoci'.

'6 Sinsekve kis' post kiso
venas... ; (Ho, ne koleru rusa
car', ; ĉar kiu min al koro
prenas ; nur vivas en la - kvina
jar'!)

'7 Gardisto al fenestro pasas...
; Per pugnosku' li pelas ŝin. ;
Ŝi, kiel song' fluganta, lasas ;
en la karcerero - sola min.

& Joe Hill:

< Ripete 9 el 37 batoj por strofo, entute 259 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Alfred Hayes. Komponis Earl Robinson. El angla tradukis Jomo Ipfelkofer. Joe Hill (1879-1915) estis sveda enmigrinto en Usono. Tie li kontraŭbatalis la ekspluatadon de la laboristaro farab la estroj de militaj fabrikoj. En ŝajnproceso li estis mortkondamnita pro "murdo". Liaj lastaj vortoj antaŭ la ekzekuto (la 19-an de novembro 1915) estis: "Ne funebru pri mi - organizu vin!". Klarigoj (*): '1 Ellasiĝis akuzativa finaĵo. >

(#Melodio:

<:37> (So /Mi So So oSo Mi So So o;So La do do La do o; So do do do oSo Ti La So o;Mi Re Re Ti Ti So o; Mi So So La So Do o)×7)+

(&Strofoj:

'1 Last/nokte vidis mi Joe Hill*, ; En song' aperis /li. ; Mi diris: "Ĉu ne mortis vi?" (; – Neniam mortis mi.)×

'2 Ili ekzekutis vin, Joe Hill, ; Timigite diris mi. ; Nu jes, - respondis li kun rid', ; Sed tamen vivas mi!

'3 Lu* kupro-estro murdis vin, ; Mortpafis vin, Joe Hill! ; La korpo mortis, - jesis li, ; sed tute ne l' anim'!

'4 Li staris apud mia lit' ; Kaj ĝoje diris mi: ; Do, ne trafite, la spirit' ; Ĝi vivos plu sen tim'!

'5 Neniam mortis de Joe Hill ; La memor' al l' subpremad'. ; Subtenas laboristojn li ; En ilia batalad'.

'6 En tuta mond' , - al mi li krias ; Vi ĉie trovos min, ; Kie strikas, luktas, liberiĝas ; Frato kaj fratin'.

'7 Lastnokte vidis mi Joe Hill, ; En song' aperis li. ; Mi diris: "Ĉu ne mortis vi?" ; Neniam mortis mi.)

& La leporo kaj la testudo:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 259 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per sama melodio kiel por "Konfeso" kaj simila rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:37> (/dodo dore doTi LaSo; dodo dore mimi mimi; mifa soso somi mire; dore doTi LaLa LaSo;

(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; LaTi dodo dore mimi; mifa somi mire do; do mire do dodo Ti La a)

)×7)+

(&Strofoj:

'1 Nomis la leporo moke ; la testudon pigra, lama. ; Tiu kriis: "Ej! Aroge ; vantas vi, kuristo fama,

(×:; **Zorgojn ĝi foje forgesas ; Ĝi pri kuro tro promesas ; Ĉu testudon venkus ĝi ; Zorgojn ĝi foje forgesas.**)

'2 tamen, se ni kurus vete, ; mi vin certe venki povus." ; "Buŝe!" — diris mokridete ; la leporo — "ĉu ni provus?"

'3 "Jes!" konsentis la testudo, ; ili do la provon faris. ; La spektaklon de l' vetludo ; multaj bestoj ĉirkaŭstaris.

'4 Vulp' aranĝis la aferon: ; Ĝi de arb' ĝis alta fosto ; signis rektan karieron, ; signis starton per la vosto.

'5 La testudo sciis certe, ; ke per kruroj sen elasto ; ne galopas ĝi tro lerte, ; do ekiris sen prokrasto.

'6 La leporo firme fidis ; je la granda krur-facilo, ; do ĝi tute ne rapidis, ; eĉ ekdormis en trankvilo.

'7 Ĝi vekiĝis ... hop ... ekkrie ; la aeron sage fendis, ; estis jam en cel'. Sed tie ; la testudo ĝin atendis.)

& Ne okazas duaj fojoj:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 259 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Wisława Szymborska (Vokado al Jetio, 1957). Tradukis Lidia Ligeza (Mi inventas la mondon, 2015). Baladigis Martin Strid (2016) per sveda ŝotiso laŭ Karl Gudmundsäter kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:37> (/LaSi LaTi dodo dodo; LaSi Lado TiTi TiTi; MiMa MiSi Tire doTi; LaTi LaSi MiMi MiMi;

(#Rekantaĵe: MiSi TiLa Si Mi; Mimi mire do La; Lado TiLa SiMi SiTi; TiLa LaSi Mi i; TiLa LaSi MiSi La a)

)×7)+

(& Strofoj:

'1 /Ne okazas duaj fojoj, ; nek okazos. Jen pro kio ; ni naskiĝis spertomankaj ; kaj ni mortos sen rutino.

(×:Paŝu kun fiero ; Paŝu sur la tero ; Jen mi venas, ĉene tenas ; Paŝu kun fier' ; Paŝu sur la firma ter'.)

'2 Se eĉ estus ni lernantoj ; plej obtuzaj sur la tero ; ni sukcesus ripetadi ; nek printempon, nek someron.

'3 Ne ripetos ni la tagon, ; post la nokt' ne venos biso, ; ne identas duan fojon ; la rigardo, premo, kiso.

'4 Laste, kiam iu laŭte ; ĉe mi diris vian nomon ; estis al mi kvazaŭ rozo ; trans fenestro falus domon.

'5 Nun, kiam ni estas kune ; mi rigardas la plafonon. ; Rozo? Kiel ĝi aspektas? ; Ĉu ĝi – flor'? Aŭ eble ŝtono?

'6 Kial vi, malica horo ; al malcert' kaj tim' nin pelas? ; Venis vi – do devas pasi, ; pasos vi – kaj tio belas.

'7 Ridetante, brakumante ; reatingas ni trankvilon, ; kvankam, kiel du akveroj, ; ni prezentas malsimilon.)

& Balado pri ulo:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 261 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis kaj komponis Gianfranco Molle (Horo da opozicio, 1979). Baladigis Martin Strid (2015) per nova melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodioj:

<:29> ((#Molle: /soso soso mi h, So soso soso mi h; So soso soso mi h; mi sofa mire do h) ?

(#Strid: /do do remi fa; fa mimi rere do; so soso lala so; fa mimi rere do; (#Rekantaĵe: dodo remi fa fa; lala lala tila so; fafa sofa mi; dodo remi fa fa;))

)×9)+

(&Strofoj:

'1 /Estis foje ul' ; Tretinta per pied' ; Per nuda la pied' ; Fekaĵon en angul'

(×: **Paŝu per piedoj ; dancu, prancu ĝoje jen ; en la tondra ĉen' ; paŝu per piedoj.**)

'2 Li diris tuj ke li ; Per sia la pied' ; malpura la pied' ; Ne marŝi volis pli

'3 Ne estis tie akv' ; Por lav' de la pied' ; Por lav' de la pied' ; Ne estis tie akv'

'4 Li pensis per hakil' ; La kruron tranĉi for ; Ĉi-kruron tranĉis for ; Li haste per hakil'

'5 Li hastis eble tro ; Tranĉitas bona krur' ; Tranĉitas pura krur' ; De nia la hero'

'6 Tuj kaptis lin koler' ; Kaj venis al la mens' ; De li la firma pens' ; Tranĉendas eĉ ceter'

'7 Piedoj kuŝis du ; Malvarmaj kaj sen viv' ; kaj staris pro naiv' ; La ulo sur genu'

'8 Tranĉis la parti' ; Piedojn multajn for ; Piedojn bonajn for ; Ordonis la parti'

'9 Ekzistas tamen sed' ; Ĉar male ol en fabl' ; partie kun probabl' ; Rekreskas la pied'

& Istedzinoj ĉiaj:

< Rekante 13 el 29 batoj por strofo, entute 261 paŝoj dum 3 minutoj. Norda Kantaro #4105. El sveda tradukis Martin Strid (2008).>

(#Melodio:

<:2,3> (/La Lado /mi mimi /mi rere /mi i; /do do /Ti i;Ti /do do /re re /do La /Ti i; /Ti Mi /Si La /Ti do <:3>/La a h)×9)+

(&Strofoj:

'1 /Aĝaj tri /gantoj kaj
/nov'tri'ŝu' /jen ; /hura /hej! ;
Kam/puled/zino /draŝas da
/gren' ; /ĝojas /la vi/rino /plej/.

'2 /Grenon ŝi /draŝas, do
/stokas da /rent'

(×:; /hura /hej! ;)

Ŝi/pisted/zino a/tendas al
/vent'

(×:; /ĝojas /ta vi/rino /plej/.)

'3 /Venton ŝi a/tendas,
a/tendas al a/er'
Ŝu/isted/zino /tanis da /led'

.....

'4 Se /ledon ŝi /tanis, bo/ligas
da /gudr' Muzi/kisted/zino
/faras da /lud'

'5 Se /ludon ŝi /faras, ŝi /vokas
hu/ra' Sol/dated/zino
el/tiras na /glav'

'6 Se /glavon el/tiras, ŝi /pikas
per /forto Bu/ĉisted/zino
/pikas /porkojn

'7 Se /porkojn ŝi /pikas, ku/iras
da /farĉ' Sin/jorservis/tinoj
for/manĝas /largê

'8 Se /ne havos /farĉon, do
/kuras al kol/baso aŭ /sen
kol/bas' Norve/gajen pa/ŝas
.....

'9 Al/venas Norve/gajon, ne
/trovas da loĝ/dom'
Ek/stere mal/varmi /devas la
/homoj ; /povru/linoj /en
ĝe/mej'.)

& La Amo de la Fiŝkaptisto:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 261 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis kaj komponis Gerhard Schöne (Die Liebe des Fischers). El germana tradukis Bertilo Wennergren kaj Birke Dockhorn. Baladigis Martin Strid (2016) per disdivido de strofoj kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:29> /(mimi mimi mimi remi redo doTi do;)×2

(#Rekantaĵe: MiMi MiMi MiMi MiMi MiLa LaLa La; MiSi SiSi SiTi TiTi Tire rere re e)

)×9)+

(&Strofoj:

'1 Fiŝoj fuĝis sub la ŝtonojn.
Suno kaŝis sin. ; Fiŝkaptisto
juna venis re je l' tagofin'.

(×:; **Danco fluas, tondre
bruas en la festa hal' ; Akvo
fluas, ondoj bruas sur la
vasta mar'.**)

'2 En mantelo nigra lin atendis
ĉe l' haven' ; la juĝisto de l'
ĉeftero. Li parolis jen:

'3 Oni kaptis junedzinon vian
ĉe la far' ; adultantan kun
fremdulo fian sen kompar'.

.....

'4 Laŭ kutim' insula je matena
kri' de kok' ; ni ŝin puŝos en
la morton de la monta rok'.

.....

'5 Preĝis juna fiŝkaptist' en
malfeliĉa hor': ; "Koro, el la
brusto mia nun ne saltu for!"

.....

'6 Nokte grimpis li kuraĝe sur
la rokomur' ; super la abismo
ligis reton de sekur'.

'7 Ŝtopis ĉion li per pajlo kaj
per branĉetar' ; kaj la tuton
kovris li per fojno sen avar'.

.....

'8 Kiam la unua lumo venis de
la sun' ; oni puŝis ŝin. Ŝi falis,
sed al mola pun'.

'9 Ĉar la reto de pardona amo
kaptis ŝin. ; Fiŝoj ludis sub la
ŝtonoj. Suno montris sin.)

& Avertto:

< Rekante 27 el 53 batoj por strofo, entute 265 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butikoj, 1931). Baladigis Martin Strid (2017) per polsa melodio sveda, kun takta modifo, kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:53> (# Sparven lilla:

a;Ti /Tido LaSi MiiSiSi Tido LaSi MiiSi;Si Tido LaSi MiiSiSi
Timi miri mi mi;Ti Tido LaSi MiiSiSi Tido LaSi MiiSi;Si Tido
LaSi MiiSiSi Timi miri mi mi

(#Rekantaĵe: do Lado mimi reTi SoTi re;Ti do Lado mimi reTi
SoTi re;Ti do LaSi MiMi SiMiSi La La a;Ti do LaSi MiMi
SiMiSi La Tido LaSi La)

)×5)+

(&Strofoj:

'1 Vi /estas vendistino en urba
magazeno ; Kaj de ŝminkaĵoj
pruntas la sanon de l' vizaĝo, ;
Ĉu tial vi forgesis pri hejmo
kaj deveno ; Dum via patro
tondas la hundojn de l' vilaĝo?

(×.; **Plaĉas la ritmo de
rakonto ĉi ; kaj maĉas la
vortojn de l' rekanto ni ; ĉar
saĝe rakontas la baladestro ;
kaj dume renkontas ja la
dancantojn de l' ĉeno mi.)**

'2 Se foje – tre malofte –
parade vi revenas ; Al hejma
kabaneto tagmezon dum
dimanĉo, ; Afekte ĝian
lingvon jam ne plu vi
komprenas ; Kaj honte vi
ignoras eĉ trajtojn de l' fianĉo.

.....

'3 Mi amas vin, Salika, – mi
rajtas do riproĉi, ; Ke vi la
nazon portas tro super la
nivelo, ; Ke vi aspektas
kvazaŭ vi celus tuj dekroĉi ;
Per aroganta movo la stelojn
de l' ĉielo.

'4 Fiera vendistino, vin kaptis
iluzio ; Kaj vane vi esperas
plenumon de l' miraklo, ; Ĉar
ĉe l' altara pompo de via falsa
dio ; Vi genufleksas antaŭ
malplena tabernaklo.

'5 Revenu sur la vojon
signitan de l' destino, ;
Forgesu kavajn vortojn de
danda kavaliro, ; Ĉar kiam
rozoj velkos, – la dornojn,
vendistino, ; La kavaliro lasos
al simpla.. kala viro.)

& Viro de mia revo:

< Rekante 27 el 53 batoj por strofo, entute 265 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Grigorij Arosev (Literatura konkurso Liro, Kaliningrad 2003). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:53> (/(mi Lami mido Tiirere reTi La; doododo TiTi La So La doTi La;)×

(#Rekantaĵe: SoLaTi do dodo redo mi; so somi mire re; so soti laso mire mido; So So doTi La Fa So o; SoLaTi do dodo redo mi i))×5)+

(&Strofoj:

'1 /Viro de mia revo de mia viv'. ; Strangas konsci' ĉi tiu – ĉu estas lud'? ; Ĉu por la rev' ekzistas kial', motiv'? ; Mi fluas peĉe, vakse pro la apud'.

(×:; **Verda folio en arbaret'**
Flugu per danca tret' ;
Kukolon timas rubekolo ;
Gardas ovon ĝian ĝi ; Verda folio en arbaret'.)

'2 Ĉio leĝere glitas en nia kun',
; mi vin karesas ĝue sen ajna dev'. ; Ĉio palpeble glatas en nia nun', ; viro de mia vivo de mia rev'.

'3 Amo de mia vivo de mia rav' – ; ĝi, atendata ĉiam, mem estas rar'. ; Ĝi, mensoganta ofte, mem estas prav', ; ĝi, ofertata kore, mem estas kar'.

.....

'4 Vivo de mia revo de mia ver', ; dankon pro la ĉeesto en mia am'. ; Vi estas milda dolĉa amara ber', ; vi ŝajnas la alio, sed estas sam'.

'5 Vento de mia monto de mia rur'. ; Mi ne kliniĝas dekstren, ĉar estas liv'. ; Mi tre feliĉas – jen estas mia nur', ; viro de mia revo de mia viv'.

& Bona negoco:

< Rekante 18 el 31 batoj por strofo, entute 271 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Alois Norbert (kaŝnomo de Alois Berndl) (La mondo ridas, Vieno, 1937). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo de Sigmunda balado.>

(#Melodio:

<1,5:31> (

/mi mi dore mi mimi mimido re fa;fa mimimi mimimi mimido re fa;

(#Rekantaĵe: mire do; do3mi mimi re do; rere rere re re; mi mi3re doTi La; So3mi mimi re do))×9)+

(&Strofoj:

'1 /En sukeraĵejon sinjoro eniris. ; "Mi torton deziras" rapide li diris.

(×: **En la ĉen' ; Dancu nun trankvile ; Ĉiuj ni trankvilas ; Jen en amika ĉen' ; Dancu nun trankvile.**)

'2 Vendisto rapidis kaj ĉion aranĝis, ; Sed sian deziron la viro nun ŝanĝis:

'3 "Reportu la torton kaj donu do vi ; Porcion da krem-glaciaĵo al mi!"

'4 Manĝinte la viro foriri tuj volis, ; Sed jen la vendisto admone parolis:

'5 "Pardonu, sinjoro, vi ne jam ĝin pagis!" ; "Ĉu pagi?" li diris; "mi juste ja agis:

'6 Mi manĝis ja nur glaciaĵon ĉe vi ; Kaj donis porcion da torto por ĝi."

'7 "Vi estas ja prava; vi tiel ja agis. ; Sed tamen: Vi ankaŭ la torton ne pagis!"

'8 Sed nun la sinjoro treege ekmiris, ; Kaj al la vendisto kolere li diris:

'9 "Ĉu pagi la torton? Ĉu mokas vi min? ; Mi ĝin ja redonis! ; Ne manĝis mi ĝin!"

& La blondulino:

< Rekante 20 el 34 batoj por strofo, entute 272 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Dionisios Solomos. El greka tradukis Antoni Grabowski (Parnaso de Popoloj, 1913). Baladigis Martin Strid (2016) permelodio kaj rekantaĵo de Vilmunda balado.)

(#Melodio:

<1,6:34> (/falmi sofa fami miire;re rere dore mi; mi fami fami faaso;so sofa fami reldo;

(#Rekantaĵe: mimi fa mi re; rere dore mi; mimi mimi mi fa;so sofa fami fami reldo; mimi fa mi re e))×8)+

(&Strofoj:

'1 /Mi² vidis ŝin hieraŭ ;
Malfrue: Blondulin' ; Eniris
barkon, kiu ; El hejm' forportis
ŝi²ⁿ.

(×: **Dancu mastrino ; belan
elektas mi. ; Dancu min al
mano ; ja bele kiel povas vi².
; Dancu mastrino.**)

'2 Plenblovis blankajn velojn ;
De l' freŝa vento flu' ; Kiel
kolomb' etendas ; Blank-
flugiletojn du.

'3 Salutis ŝi amikojn, ; Salutis
kun malĝoj' ; Adiaŭ-redirante
; Per tuk' je lasta foj'.

'4 Kaj post la salutado ; Mi
restis tie ĉi, ; Ĝis malproksimo
ĉion ; Forkaŝis jam al mi.

'5 Mi post mallonga tempo ;
Ne scius diri jam, ; Ĉu brilas
blanka velo ; Aŭ mara ŝaŭmo-
skvam'.

'6 Post kiam velon, tukon, ;
Forkaŝis akvo-stri' ; Ekploris
la amikoj, ; Ekploris ankaŭ mi.
.....

'7 Ne barko min plorigis, ;
Nek vel' plorigis min, ; Mi
ploris pro iranta ; Fremdejon
blondulin'.

'8 Ne ploras mi pro barko, ;
Kun blanka vel' sur mar', ; Mi
ploras blondulinon ; Kun ŝia
blonda har'.)

& Sanga nokto aŭ venĝo de Amoro:

< Rekante 20 el 34 batoj por strofo, entute 272 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Julio Baghy (Preter la vivo, Budapeŝt 1923) kun enkonduka noto "Balado el la dudeka centjaro". Baladigis Martin Strid (2017) per feroaj melodio kaj rekantaĵo de Vilmunda balado.>

(#Melodio:

<1,6:34> (# Vilmunds kvæði: e;fa /fami sofa fami mi;re rere dore mi;mi mimi fami fami fa;so sofa fami reldo;

(#Rekantaĵe: mimi fa mi re; reerere dore mi; mimi mimi mi fa;so sofa fami fami reldo; mimi fa mi re))×8)+

(&Strofoj:

'1 Ĉe /sunsubir' la amsopir' ; la koron de knabin' ; instigas jen por noktpromen' ; kun knab', amanta ŝi2n.

(×: **Dancu mastrino ; belan elektas mi. ; Dancu min al mano ; ja bele kiel povas vi2. ; Dancu mastrino.**)

'2 Kaj kompliment' de arda sent', ; alloga sorĉa fort' ; nun pelas ŝin kaj lin al fin': ; al domo en la kort'.

'3 Dum idili' la amo-di' ; ridetas kun petol'... ; En luna bril' muzikas gril' ; por la duopa sol'.

'4 Sed - ho ĉiel' - la sortkruel' ; frapadas sur pavim'! ; Pro tio jam la fajra flam' ; estingas sin en tim'... ..

'5 Nun, kiel bov', kun laca mov' ; aperas grasa vir' ; kaj sonas klak', bruanta krak' ; kun grumble ronka spir'... ..

'6 Interne du atendas plu ; por bona kur-okaz'... ; Ekstere kri'! Fenestron li ; ekrompis per la naz'.

'7 Terure! Sang' el grasa vang' ; kaj nazo fluas for. ; Kun plenda blek' al apotek' ; lin pelas la dolor'.

'8 Moralo el ĉi sangfabel': ; La nazon tenu for ; de amrilat', ĉar venĝobat' ; vin trafos de Amor'.

& Ho malamik':

< Ripete 37 sed rekante 29 el 55 batoj por strofo, entute 275 paŝoj dum 4 minutoj . Verkis Dildar (1938) poemon Ey Reqîb kiu poste fariĝis kurda himno. Tradukis Arnulf Naif kaj Martin Strid (2017).>

(#Melodio:

(#: /Sodo do do hdo dolre mire reldo Tire doTi La

(; LaTi doTi LaTi SoSo do Tire do h)×2

(Rekantaĵe: (Sododo dododo Tire dodo;)×2

dolTiLa TilLalSo So h

(dodore mire dolTi LaSo do Tilre do h)×2 h)

)×5)+

(&Strofoj:

'1 /Viva restos la ku²rda
popo²lo, ho malamik'. ; (; Ĝin
neniam ajn disrompos armila
pik'.)×

(×: (**Diru neniu ke kurdoj
mortos ;**)× **Ku²rdoj vi³vas,
(vivas, neniam fa²los la
kurda² flag'.)×)**

'2 Revoluciaj ni estas junuloj
ruĝaj en ver' ; Vidu, verŝis
kiom da sango ni por ofer'

'3 Estas Meda kaj reĝa
Kjaksara ni infanar' ; Ĉiam nia
patrujo jen fido kaj eĉ altar'

.....

'4 Ellitigis sin kurdaj junuloj,
ho jen leon' ; por per sango sia
ornami je vivo-kron'

'5 Ni junuloj nun estas jen
pretaj kun la sincer' ; Ĉiam
korpojn oferas ni, korpojn do
jen ofer'

& Sven en Rozgarden':

< Rekante 15 el 23 batoj por strofo, entute 276 paŝoj dum 3 minutoj. Norda Kantaro #4478. El sveda tradukis Kukoletto (1993 FLOE).>

(#Melodio:

<1,7:23> (/LaaSiSi LaLa mi mi; remi redo Ti i; TiTi reerere Ti do; LaLa doLa Si h;Si La LaLa milre doTi La La ah)×12)+

(&Strofoj:

'1 /Kie vi longe estis

(×:; **Sven en Rozgarden'?** ;)

Estis mi en la stalo

(×:; **kara nia panj' ; Atendu min ĉiam neniam.**)

'2 Kion vi faris en stalo La ĉevalojn mi akvis

'3 Kial ĉemizo sangas Min hufbatis blanka ĉeval'

'4 Kial la glavo sangas Fraton mi mortbatis

'5 Kien vi povas iri Mi de l' lando fuĝos

'6 Kion l' edzino faru

Ŝpinu ŝi por pano

'7 Kion viaj infanoj faru Ili petu ĉe ĉies pord'

'8 Kiam vi revenos Kiam cigno nigros

'9 Kiam nigros cigno Kiam korvo blankos

'10 Kiam blankos korvo Kiam plumo sinkos

'11 Kiam sinkos plumo Kiam ŝtono flosos

'12 Kiam flosos ŝtono Flosos ĝi neniam

& La borso gvidas:

< Rekante 14 el 31 batoj por strofo, entute 279 paŝoj dum 4 minutoj. Poemon unupartan "Deklaracio" verkis William Auld. Poemon duupartan "Diplomatoj kunsidas... La borso gvidas" verkis Eŭgeno Miĥalski ("Fajro kuracas", EKRELO, 1932, represita de l' "Omnibuso", 1984). Baladigis Martin Strid (2015) per novaj rekantaĵo kaj du melodioj. Alternativaj tria melodio kaj rekantaĵo estas tiuj de Granda bovo, Norda Kantaro #4430.>

(#Melodioj:

<:31> (

(#Unua: La /LaTi dore mifa sooso;mi mimi rere mido doodo;do dore mifa sola tiiti;la soso soso sofa mimi;

(#Rekantaĵe: mimi rere mido dodo; mimi doTi LaTi dore; mifa somi mi lre do o))

?

(#Alia: a;La /mimi mido rere reedo;do doLa dore mimi miimi;mi mimi mido rere reedo;do doLa doTi LaLa LaLa;

(#Rekantaĵe: mire doTi doTi LaSo; LaLa dore mimi mimi; mire doTi do La))

?

(# Granda bovo: <1,5:> /LaaTiTi doTiLaSi /Laldo mii;mi /soofa mire /TiTi reere;re /doore miireldo /TiSi MiiMi;Mi /LaaTi doLa /SiLa LaLa;

(#Rekantaĵe: /LaaSiLa Ti; /dooTido refa /miidoTi La; /Laadore miimimi /soomire mi; /miidoTi La; /Tiidore mi /iSi SilLa /La;))

)×9)+

(&Strofoj:

& Deklaracio:

'1 La /produktistoj en la lando ; facile en mizeron falas, ; dum iu monmanipulanto ; per ĉia lukso sin regalas.

(×:; **Frandu, ŝmacu en palaco ; Lumaj vortoj, nigraj mortoj ; Fajro jen kuraco .)**?

(×: /**Turnas en tord' ; /ŝtrumpoj voleme /kurbas en kord' ; /Faros fripono kvel* /burĝa la ul' ; /mallarĝa pord' ; /rozojn ele-/ektu ru2/ĝajn.)**

'2 La homo, kiu riĉojn kreas, ; ekzistas en hazarda stato, ; dum la produktabundo ĉeas ; en manoj de minoritato.

'3 Kaj min turmentas, turmentegas, ; maljusto de l' anomalia, ; ke nian riĉan mondon regas ; profito kaj privilegio –

'4 anomalia forigenda ; per ĉiu forto kaj rimedo! ; Jen estas bazo fundamenta ; de mia politika kredo.

& Diplomatoj kunsidas:

'5 Senarmigo-konferencoj, ; proklamantaj pri la pac' ; Diplomatoj-ekscelencoj ; kunsidantaj en palac'.

'6 Flamaj vortoj, – submurmuro, – ; jen ekstero kaj intern': ; pacifista uverturo ; antaŭ la milit-oper'.

'7 Paragrafoj de l' traktato ; de Wilsono kaj Kellog'. ; Sed pri ĝi jam skribas fato ; vortojn de la nekrolog'.

'8 Ĝus naskiĝis, tuje mortas ; provoj de l' pac-organiz', ; ilin kun solen' eskortas ; demokratoj-mobiliz'.

'9 Lumaj vortoj, – nigraj faroj, ; jen ekstero kaj intern'. ; Dancu, paco-komisaroj, ; sub la Borsa orguvern'.)

& Al mizantropoj:

< Rekante 19 el 35 batoj por strofo, entute 280 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butikoj, 1931). Baladigis Martin Strid (2017) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por &Miskompreno. Klarigo (*): '4 La dek ordonoj de dio laŭ juda kaj ĥristana libro de Moseo.>

(#Melodio:

; <:35> (

/domi somi lami soso; fare mido reTi do; domi somi lami soso;
fare mido reTi do;

(#Rekantaĵe: so3mi domi reeredo TiSo; so3mi domi reeredo TiSo;
domi soosomi laalami soso; fare mido reereTi SooLaTi doTi do
o))×8)+

(&Strofoj:

'1 /Kelkaj kun ĥimeroj sidas;
Hejme apud sia forn' ; Kaj la
mondon ili vidas ; Nur tra
lens' de sia lorn';

(×:; **Kantu nun per forta la
voĉo ; Kantu laŭte kaj dum
diboĉo ; Kaj ni laŭdu, ne
aŭdu riproĉon ; Kantu nun
per forta diboĉa la vorta
voĉ'.**)

'2 Laŭ ilia perspektivo ; Ĉion
kovras ĉasta gaz', ; Ili neas, ke
la vivo ; Pulsas sub ilia naz';
.....

'3 Ili kun sopir' fabelas ; Pri
modele dolĉa mond' ; Kaj de l'
homoj for sin ŝtelas ; Kvazaŭ
vivi estus hont'!

'4 Jes, ni scias, – post prapatro
; Ankaŭ ni, se tentas log', ;
Ofte vagas trans la kadro ; de
malvasta dekalog'*,

'5 Kaj sen nigraj okulvitroj ;
Ni konstatas, – kial ne? – ; Ke
grandparte la ĉapitroj ; De l'
Homara Epope'

'6 Ne tre glore sin prezentas, ;
(Eĉ dum tempoj de l' kultur'), ;
Sed ni des pli bone sentas, ;
Ke ni estashomoj nur... ..

'7 Ke el polvo re- en polvon ;
Tiras nin la homnatur', – Kial
do ni serĉus solvon ; de la
cirkla kvadratur'?

'8 For do la grumblantan
maskon, ; La grimacon de l'
cenzur', ; Kaj plenumu vian
taskon: ; Esti homoj! – Homoj
nur!

& Faŝismo:

< Rekante 18 el 35 batoj por strofo, entute 280 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2017) per sama melodio kiel por &Konfeso kaj nova rekantaĵo. Klarigoj (*): '3 Romia generalo Cezaro fame diris "Veni, vidi, viki" (Mi venis, mi vidis, mi venkis). '5 Liro, iama monunujo, italavro.>

(#Melodio:

<:37> (/dodo dore doTi LaSo; dodo dore mimi mimi; mifa soso somi mire; dore doTi LaLa LaSo;

(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; La3La LaTi LaSo SoSo; SoSo SoSo LaSo do; do mire do dodo Ti La a)

)×8)+

(&Strofoj:

'1 /Ĉu heroojn li ĵaluzis ; De l' antikva glora Romo? ; Aŭ ĉu eble lin konfuzis ; Kaj allogis... glori-romo?

(×:; **Zorgojn li havas por gajno ; Dume eĉ ne pravas ŝajno ; Lia vanto hantas lin ; Zorgojn li havas por gajno.**)

'2 El "Hamleto" li parkere ; Citis al la tuta lando: ; "Estri aŭ neestri? vere, ; Tiel staras la demando!"

'3 Kaj li igis tuj afiŝi, ; Ke li ankaŭ, saman horon, ; Povis... "Veni, vidi, viŝi*... ; De la frunto venkan gloron!"

'4 Lian nomon jam admiras ; Kaj balbutas suĉinfanoj; Pli da famo li akiras ; Ol heroo de... romanoj!

'5 Ne rompiĝis lia Liro*, ; Ĝi firmiĝis post la falo, ; Tial ĝojas kun ekspiro ; Ĉiu bona kap-italo!

'6 Barkon de la ŝtato prezidas ; De l' Ministro forta volo; Ĉiuj kantas! – Li nur gvidas; Estas lia... barka rolo!

'7 Kontraŭul' ne kontraŭstaras ; Al "frapantaj" argumentoj, ; Kiam lian vojon baras ; Kelkaj fortaj varb-agentoj;

•
'8 Lin konvinkas la ricina ;
Boteleto, kaj mi taksas, ; Ke
eĉ viro plej obstina ; Tiam tuj
kapitu...laksas!!)

& La nobla arto:

< Rekante 18 el 35 batoj por strofo, entute 280 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:35> (

a;do /Lado mido TiTi TiiTi;Ti doLa Lado mido Ti Mi;Ti doLa
Lado mido Ti Mi; doTi La La;Ti

(#Rekantaĵe: doLa Lado mido Ti Ti;Ti doLa Lado mido Ti Ti;Ti
doLa Lado mido Ti Ti; Mido doTi La La)

)×8)+

(&Strofoj:

'1 "El /sporto venas sana
forto!" ; Zorgema do pri sana
forto ; Mi min dediĉis al la
sporto ; de boksarto.

(×:; **Ho savu min de la pereoj
; Se batos min mi tuj kabeoj
; Nenion mi valoran kreos ;
Se mi nun paneos.**)

'2 Kun nigra negro tiucele ; Mi
studis sporton laŭ la modo: ;
Li min instruis senŝancele ;
kun metodo.

'3 Dum en nudeco mi nedece,
; Honteme antaŭ li promenis, ;
Karnaĵon mian li promese ;
Ekzamenis... ..

'4 Mi time provis el la "Ringo"
; Forkuri sen saluto. ; Sed
trafis min jam sur... laringo ;
Uperkuto*!

'5 Mi lin rigardis
senkomprene, ; Sed tuj klerige
nigra brako ; Kareson sendis
specimene ; Al stomako... ..

'6 Kaj plue li min sen rimarko
; Frakase rulis jam sur planko,
; De tio restis eĉ... postmarko;
Sur bildflanko!

'7 Blasfeme tamen mi ekjuris ;
Kaj vane frapis sur rok-haŭton
; Dum li responde min
tamburis ; En knokaŭton!

•

,& Apoteozo:

'8 Kaj dum mi kuŝis
forsveninte ; Mi vidis stelojn
briletantajn, ; Du-cent-mil
stelojn verd-kvinpinte ;
Esperantajn!!)

& Se estus ĉi tie:

< Ripete 28 el 56 batoj por strofo, entute 280 paŝoj dum 4 minutoj. El ĉeĥa (?) tradukis Vladimir Türk.>

(#Melodio:

<:2> (

(/dodo dodo /dore h /mimi mifa /mido h /h; Tido /remi redo /h h;)

(/fafa fafa /fare h /mimi miso /milre doh /h; Tido /remi redo /h h)×
)×5)+

(&Strofoj:

'1 /Se estus ĉi /tie /tia
knabi/neto, /; kiu /min avidus
/; /Se estus ĉi /tie /tia
knabi/neto, /; kiu /min avidus /
/ŝi ja devus /al mi /doni belan
/fi2lon, /; resti /virgulino /; /ŝi
ja devus /al mi /doni belan
/fi2lon, /; resti /virgulino /

'2 (Se mi devus al vi doni
belan filon ; resti virgulino ;)×
(vi ja devus por li fari la
lulilon ; sen eĉ tuŝi lignon ;)×

'3 (Se mi devus por li fari la
lulilon ; sen eĉ tuŝi lignon ;)×
(vi ja devus por mi kudri la
ĉemizon ; sen faden', kudrilo
;)×

'4 (Se mi devus por vi kudri la
ĉemizon ; sen faden', kudrilo
;)× (vi ja devus por mi fari la
eskalon ; ĝis la firmamento ;)×

'5 (Se mi devus por vi fari la
eskalon ; ĝis la firmamento ;)×
(grimpos ni ja sunen, falus ni
komune ; estus fin' de ĉio. ;)×
)

& Infanoj ĉe montrofenestro:

< Rekante 25 el 47 batoj por strofo, entute 282 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis K. Kalocsay (Streĉita kordo, 1931). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,5:47> (/doododo dodo mimi dodo reTi; do TiTi dore mido TiLa SooSo;So dodo dodo mimi dodo reeTi;Ti dodo TiTi dore mido Ti Ti;

(#Rekantaĵe: dodo TiTi doTi LaSo; mi rere miimifa somi fa mi; la lala soso fafa sofa mi mi; fa mi; dodo TiTi doTi La So o)

)×6)+

(& Strofoj:

'1 /Montrofenestron miras du infanoj. ; Malriĉaj. Knab', knabino. Ĉe ŝi: pupo. ; Mizera pup'. El ĉifonaĵ' kaj stupo ; Farita fuŝe per mallertaj manoj.

(×: **Forto kreskas, adoleskas, ; fariĝas granda rustika arbo ; Kiel ni semas, tiel ni rikoltos ; florojn ; Forto kreskas, adoleskas.**)

'2 Al vitro gape ili premapogas ; La nazojn. Aŭto, urso, lulĉevalo, ; Armeo plumba, pup' kun silkvualo: ; Ludilmirakloj tie ilin logas.

.....

'3 Kaj plezurante pri l' senpaga festo, ; Faligas ŝi la pupon,

dum ŝi revas. ; Kaj ŝi surpaŝas. Pupohaŭto krevas. ; Tra l' vund' elŝovas sin la stup-intesto.

'4 Nun ŝi rimarkas. Staras en konfuzo. ; Ekploras. Levas ŝi la pupon mole. ; Al brusto premas, lulas ĝin konsole, ; Viŝante siajn larmojn per la bluzo.

'5 La knab' pli aĝa, kun
mallerta peno ; Konsolas ŝin,
sed ne efikas multe. ; Pli kaj
pli larmas, ploras ŝi singulte, ;
Jam ili falis el infan-edeno.

.....

'6 Kaj nun, transvitren, al
infan-ĉielo, ; Rigardas li kun
brakoj krucmetitaj, ; Senpove,
mute, kun okuloj spitaj, ; Kiel
simbolo eta de l' Ribelo.)

& Vintra fabelo:

< Rekante 23 el 47 batoj por strofo, entute 282 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Nikolao Ĥohlov (La tajdo, 1928). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,7:47> (/rere rere mire rere rere rere dore mimi; rere rere mido do; rere rere mire dodo rere rere mido dodo; rere rere mire mi;

(#Rekantaĵo: dodo doododo mire dodo; rere rere dore mimi; dodo dodo mire dodo; dodo doododo mire dodo; rere rere dore mimi; mimi re e)

)×6)+

(& Strofoj:

'1 /Sur la sledo, svelta sledo,
post amuza kabaredo, ; Kun
tintila sonorad' ; Ni veturas --
aventuras, la ĉevaloj fluge
kuras ; Sub la stela miriad'.

(×: **Gaje dancas amato mia ;
vigle kun la ĉarmo sia. ; Ĉu
ne ridas ankaŭ via? ; Gaje
dancas amato mia ; vigle
kun la ĉarmo sia ; en la
ĉen'.**)

'2 En sereno de l' ebena
malaperas la fadeno ; De la
glata vintra voj' ... ; Mia Nita -
- am' subita, de la frost'
ebriigita ; Alpremiĝas en la
ĝoj'.

'3 En fabelo kaj sen celo
rotacias karuselo ; De la sentoj

en la kor', ; Hej, rapide kaj
senbride flugi ien, flugi fide ;
Kun favoro de Amor'!

'4 Hej, ĉevaloj, hufaj ŝtaloj,
kiel rido de cimbaloj ; Por
dancanta ciganin', ; Uraganu,
akompanu, dolĉe tiklu,
ĝutiranu ; Per freneza takto
nin!

'5 Brila neĝo -- vintra reĝo --
ĉion tenas en sieĝo, ; Gaje
ĉirpas en la knar', ; La survoja
vento ĝoja en malklara gam'
hoboja ; Vokas, logas al
kampar'.

•
'6 Unu suno -- unu junu ... la
unua febra kuno ; Kaj magia
stelpoem' ... ; Mia Nita, am'
subita, de la frosto rozkisita ;
Ĉion kronas per alpren'!)

& Deveno de la virino:

< Rekante 22 el 41 batoj por strofo, entute 287 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Ŝtefo Urban (Nova Ezopo, La Laguna de Tenerife 1961) kun noto "Fabelo versimila". Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:41> /(o;So /dodo; dore miido;do Tido Tido TiSo La La;So dodo dore mifa so mi;mi SoSo SoSo mire do do

(#Rekantaĵe: o;So dodo dore mido; Tido Tido TiSo La La;So dodo dore mifa so mi;mi SoSo SoSo mire do Tido La Fa So))×7)+

(&Strofoj:

'1 Pra-Evo, ; laŭ biblio, ; estiĝis el Adama ripo. ; Sed plene mankas la klarigo, ; kial ŝi glitis el la tipo!

(×:; **Rakontas mi fabelon ; versimilan se vi kredas ; kaj dum ni paŝas en la danco ; aŭskultu kion mi rivelas el mia kor'.**)

'2 Mi tiam ; ŝtel-observis ; la tutan kreo-proceduron: ; por povi la ateston doni, ; min kaŝis en Eburan Turon.

'3 Kaj Dio ; tiun tagon ; preparis fornĉon por la bako, ; kaj antaŭ "Estu!" li ankoraŭ ; en pipon ŝtopis la tabakon.

'4 Sed hundo, ; best' avida, ; alkuris tien laŭ la flaro, ; la ripon - ŝmac! kaj jam peliĝis ; kun akiraĵo post la baron!

'5 Nu, Dio ; persekutis ; tuj la ŝteliston, malgraŭ aĝo. ; Sed vane: en la mano restis ; kaptita hunda - posttrenaĵo... ..

'6 Kaj tiam ; kara Dio, ; la Ĉiopova, sen la osto ; Adama, kreis la virinon ; fin-fine el la hunda vosto.

'7 Pro tio ; la kreaĵo ; farita el pendolo vila ; (pri kiu temas, vi ja scias), ; de ĉiam estas maltrankvila!

& Ĥolera kanto:

< Rekante 24 el 41 batoj por strofo, entute 287 paŝoj dum 3 minutoj. Norda Kantaro #4876. Pri ŝajna morto ja estas en multaj landoj tragikaj rakontoj. Jenan verkis Alf Prøysen, Hedemarko. El norvega tradukis Kukoleto (1993 floRE). Duoble tradukiĝis strofo '1. Klarigo (*): '6 doktoro = kuracisto.>

(#Melodio:

<:2,3> (Mi /La Ti /do3do TiLa /do ore /mi i; /la afa /so fa /mi i /i; mifa /so somi /fa fare /mi mido /La; fafa /fa re /fa ami /mi La /do; rere /mi fami /re dodo /Ti La /La a;)×6)+

(&Strofoj:

'1a O/kazis /iam en ĥo/lera land'

(×:; /hu hu/huhu /hu/ ;)

entom/bigo de /ŝajnmorta /vir' ĉe viv/rand'

(×:; **Sude /rula /la, de /rula /la ; sude /ri, sude /ri, sude /rula /la.)**

'1b Iam okazis en lando de ĥoler' entombigo de ŝajnmorta vir', ho mizer'!

'2 Plej poste vidvin' iris en sekvantar' rigardante la ĉerkon, kantante sen bar'

'3 Sed kiam ĝi venis al templa angul' ek demetis kovrilon de l' ĉerk' ŝajnmortul'

'4 "Mi ankoraŭ ne mortis, jen viva figur' senutile vi portis, returnu do nur."

'5 Sed paŝis vidvino al ĉerko en front': "Nu, vi kiel kondutas, nin gardu de hont'."

'6 "Nej, dece kuŝiĝu en ĉerkon ĉi la doktor'* ja komprenas pli bone ol vi."

& Ministro-filistro:

< Rekante 21 el 41 batoj por strofo, entute 287 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929) kun dediĉo: Humile dediĉita al Ministro Bérard, kiu malpermesis Esperanton. Baladigis Martin Strid (2016) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por Sic transit gloria mundi.>

(#Melodio:

<:41> (

/LATI DoRe MiFa MiDo; LaTi doTi LaSo MiDo; LaTi doTi
LaSo Mi; ReFa MiRe DoMi So; ReFa MiRe Mi Mi;

(#Rekantaĵe: DoRe MiFa MiRe MiDo; LaTi doTi LaSo MiDo;
LaTi doTi LaSo Mi; ReFa MiRe DoMi So; TIRe DoTi LA LA A)

)×7)+

(&Strofoj:

'1 /Foje regis en Francujo ; La
Ministro de l' inkujo, ; Estis li
sinjor' Bérard, ; Klera viro,
sen erar', ; Sed – li estis stulta!

(×:; **Fluas akvo sub la ponto
; ĝis la maro de la monto. ;
Sur la ponto pasas multo ;
kaj de saĝo kaj de stulto ;
kaj por homa honto.**)

'2 Kaj li pli ol virin-amon ;
ŝatis sian propran famon, ;
Estis lia kor-dezir' ; Tuj fariĝi
glora vir' ; Kaj kolekti laŭrojn!
.....

'3 Li do pensis unu tagon: ;
"Nun mi faros gloran agon!" ;
Kaj tuj senhezite li ; Kun
laŭdinda energi' ; ... Skribis
cirkuleron!

'4 Li dekretis tre severe: ;
"Esperanto estas vere ;
Senespera utopi' ; Kaj cetere
diras Mi, ; Ke ĝi ne ekzistas!"
.....

'5 Ĉu ĉi tiu fuŝprofeto ; Nun
sukcesos per dekreto ;
Malkonstrui en moment' ; La
esperon de jarcent', ; Nian
karan lingvon?

'6 Ho, Ministro kun la Plumo,
; Via famo estas... fumo! ;
Dum, kun via cirkuler'; Vi jam
kuŝos sub la ter' ; Vivos
Esperanto!

'7 Eĉ Ministro fuŝkonsila ;
Povas esti tre utila, ; Li kun tiu
ĉi program' ; Faris certe por
reklam' ; Pli ol cent poetoj!!
.....)

& Sic transit gloria mundi!:

< Rekante 21 el 41 batoj por strofo, entute 287 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929) kun dediĉo: Respekte dediĉita al la Eks-Ministro Bérard okaze de lia eksigo. Baladigis Martin Strid (2016) per modifo de sveda melodio ŝotisa kaj nova rekantaĵo. Klarigo (*): S. F. P. E. Societo Franca por Propagando de Esperanto. (Rimarko de la verkinto).>

(#Melodio:

<:41> (

/LATI DoRe MiFa MiDo; LaTi doTi LaSo MiDo; LaTi doTi
LaSo Mi; ReFa MiRe DoMi So; ReFa MiRe Mi Mi;

(#Rekantaĵe: DoRe MiFa MiRe MiDo; LaTi doTi LaSo MiDo;
LaTi doTi LaSo MiDo; ReFa MiRe DoMi SoDo; TIRe DoTi LA
LA A)

)×7)+

(&Strofoj:

'1 /Ĉiuj grupoj Esperantaj ;
Estas denun funebrantaj, ; Ĉar
Berardo, – ho fatal'! – ; Falis
de l' pedestal', ; Falis sur
postaĵon!

(×:; **Fluas akvo sub la ponto**
; ĝis la maro de la monto. ;
Sur la ponto pasas multo ;
kaj de saĝo kaj de stulto ;
kaj por homa honto.)

'2 Sur postaĵon, jen domaĝo, ;
Ĉar ĝi havis pli da saĝo ; Ol la
kapo kaj la ventr', ; Estis ĝi l'
genia centr' ; De l' individuo!

.....

'3 Kiom havas li da peno, ;
Ĉar li estas sen posteno, ;
Eble, ke akceptus li ; Esti nun
sekretari' ; De la Sofopoe! (*)

.....

'4 Jen montriĝis la bankroto ;
De l' moderna Don Kihoto, ;
Sed la nomo de Bérard; Restos
en la kalendar' ; Eĉ post multaj
jaroj.

'5 Post jarcentoj kaj jarmiloj ;
Al pranepoj de l' prafiloj ; Oni
montros en muze' ; La
ĉefverkon de pigme' : ; Lian
cirkuleron!

'6 Ĉiuj diros kun rideto:; "Tio
pruvas, ke dekreto ; En mil
naŭ cent du dek tri ; Multe pli
ol nun ĉe ni ; Estis tute stulta!"
.....

,& Morala konkludo:

'7 Do, resume ĝi signifas, ; Ke
stultaĵo pli postvivas ; Ol
valoro kaj merit', ; Ol staturo
el granit', ; In æternum,
Amen!)

& Azena ruzo:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 290 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo sudinsulaj de Jalgrujma balado, movante la lastan verson du versojn supren kaj poste disduigante kaj la strofojn kaj la versojn.>

(#Melodio:

<:29> (/LaLa Tido TiLa La3Mi; La Tildo TiLa; dore mimi fami mimi; reldo mi miLa;

(#Rekantaĵe: dore mi redo La Fa;So La dore mimi fami mimimii; redodoo do Ti La a)

)×10)+

(&Strofoj:

'1 /Salon la azeno portis. ;
Ĝia2 marŝo ; estis malfacila
pro la ; pe2za ŝarĝo.

(×:; **Tondru danco tre ĉarme
; nun tretu fiere ĉiuj en la
ĉen' ; staras jen mastrino.)**

'2 Ĝi surborde stumblis, kaj ;
perdinte teron ; el sub la
piedoj, falis ; en riveron.

'3 Kiam el la akvo rampis ; ĝi
al seko, ; ĝi rimarkis ĝoje, kun
; jubila bleko,

'4 ke la ŝarĝo, kiu ĵus ; terure
pezis ; (ĉar la sal' solviĝis) ;
premi preskaŭ ĉesis.

'5 (kiam ĝi ŝarĝite iris ;
samavoje, ;)×

'6 saltis ĝi en akvon de l' ;
river' kompleza, ; kiu ĝian
ŝarĝon faras ; malpli peza.

'7 Ve, sed nun ne salon portis ;
ĝi surkorpe, ; spongo ĝin nun
ŝarĝis, kiu ; akvosorbe

'8 ŝvelis tiel peza, ke la ; ruz-
rezona ; besto sinkis sur la
fundon, ; mortis drona.

'9 Ofte tre sagaca ŝajnas ; la
taktiko, ; kiel ĉi azeno sen ;
dialektiko.

'10 kaj rezulte tamen havas ;
ni malŝancon, ; ĉar ni ne
esploris ĉiun ; cirkonstancon,
.....)

& La muso kaj la rano:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 290 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigas Martin Strid (2015).>

(#Melodio:

<:29> (/La dore mi mi mire fare mi do; do redo dodo doLa dodo doTi;

(#Rekantaĵe: La dore mi mi re falre mi; doTi reTi do Lado Ti Ti La a)

)×10)+

(&Strofoj:

'1 /La muso amikiĝis al la rano, ; invitis kaj regalis ĝin per pano,

(×:; **Venu mastrino en la2 ĉen' ; Prenu mian manon en firma ten'.**)

'2 fromaĝ', mielo, figo, nukso, pomo ; (ĝi loĝis en kamer' de riĉa homo).

'3 Ili festenis gaje kaj feliĉe, ; kaj kiam ili manĝis jam sufiĉe,

'4 la rano diris: "Venu al mi gastu, ; vi ankaŭ tie ne bezonas fasti.

'5 Sed por ke vi ne timu, mi per ŝnuro ; kunligos nin. Ĉe l'marĉ' al sia kruro

'6 ĝi ligis ties kruron, kaj subite ; ĝi plonĝis. Nia muso, alligite,

'7 tiriĝis kun ĝi al la marĉ', kaj veis, ; sufokiĝante tie: "Mi pereis!

'8 Vi, sendankulo, kaŭzis mian morton, ; sed estos, kiu venĝi havos forton!"

'9 Kaj jen, ĝin, dum en akvo ĝi baraktis, ; ekvidis niz', alflugis kaj ĝin kaptis.

'10 La ran' surŝnure pendis kiel pluso, ; la niz' ĝin manĝis kune kun la muso.)

& La oreloj de la leporo:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 290 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por La plej granda kulpulo.>

(#Melodio:

<:29> (/La dolre mi mi mire fare mi do; do reldo dodo doLa dodo doTi;

(#Rekantaĵe: La dore mi mi re falre mi; doTi reTi do Lado Ti Ti La a)

)×10)+

(&Strofoj:

'1 La leonon vundis besto korna. ; Li o2rdonis en kolero morna:

(×:; **Venu mastrino en la2 ĉen' ; Prenu mian manon en firma ten'.**)

'2 "Ĉiu best' havanta korn-armilon ; iru el la regno en ekzilon!"

'3 Do elmigris cervo, kapreolo, ; kapro, ŝafo, ĉamo, kaj, ĉe kolo

'4 la orelojn longajn kuŝiginte, ; por ke tiuj ne elstaru pinte,

'5 (iris en ekzilon — la leporo. ;)×

'6 La sciuro miris: "He, bapitano! ; Kien do vi iras?" "Al lontano."

'7 "Kial?" "Pro la kornoj." "Ho, ĉieloj! ; Tiuj longaj estas ja oreloj!"

'8 La leporo diris: "Ĉu por tio ; povas esti ia garantio,

'9 ke ne nomos iu el kaprico, ; favorĉaso, strebo aŭ malico

'10 la orelon longan longa korno? ; Tie ĉi evitus min la dormo."

& La spuroj:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 290 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo de Bresta balado, Norda Kantaro #4408 kaj disduigo na versoj.>

(#Melodio:

<1,5:29> (a;do /doTi redo doTi Ti;Ti LaLa LaMi LaaLa;La LaTi doTi TiTi Ti;Ti TiTi Tire dodo;

(#Rekantaĵe: TiLa La SiLa Ti La; LaaLaLa La3Mi So3So Fa3Mi; MiiMiMi LaTi do Ti La)

)×10)+

(&Strofoj:

'1 Mal/juna estis la leon', ;
mallerta jam por kuro, ; la
bestoj pli rapidaj lin ; eskapis
per forkuro.

(×:; **Paŝu gajan la dancon ;
Brilas aŭroro bele taga ;
Venu en alta somertemp'!**)

'2 Li triste sidis en la grot', ;
lin tordis la malsato, ; elpensis
fine ion, por ; sin savi el ĉi
stato.

'3 Malsana li ŝajnis sin, ;
komencis ĝemi, jelpi, ; la
bestoj lin kompatis kaj ;
venadis por lin helpi,

'4 kaj ili vere helpis lin ; —
per sia propra sango. ; Do, la
leon' festenis plu ; laŭ sia reĝa
rango,

'5 komforte tronis en la grot', ;
sen klopodado ĉasa, ; kaj eĉ
dikiĝis pli kaj pli ; per la
pensio grasa.

'6 Nu, venis foje por vizit' ; la
vulpo ruzosperta. ; "Saluton,
reĝo!" — diris li ; el
malproksimo certa —

'7 "Kiel vi fartas?" La leon' ;
respondis: "Ho plej kara! ;
Bonvenon! Vi konsolos min ;
en mia sort' amara.

'8 Sed venu pli proksimen do!
; Pro kio tiel fore ; vi staras?
Venu, venu jam! ; Jen ĝemas
mi dolore,

'9 balzamon al agoniant' ; per
belaj vortoj donu!" ; La vulpo
diris nun: "Ho reĝ"! ; Saniĝon!
Kaj, pardonu,

'10 foriri mi preferas, ĉar ;
kondukas, plej mistere, ;
internen multaj spuroj, sed ;
neniu alekstere."

& Mian vazon se mi mortos:

< Ripete 19 sed rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 290 paŝoj dum 3 minutoj. Norda Kantaro #4854 kaj #5288. El sveda tradukis Martin Strid kaj takton baladigis. Klarigo (*): '1 Temas pri nokta vazo.>

(&#Melodio:

<1,8:29> (/SoLa dodo dodo LaSo MiSo do o; dore mimi mimi somi domi re e ; sofa mimi mimi redo; dodo LaLa LaLa redo; TiLa SoSo SoSo fare TiSo do o)×10)+

(&Strofoj:

'1 (': /Mian vazon* (×: **se mi mortos havos vi**)) (,,: Mian vazon (×: **se mi mortos havos vi**;) ĉar ja supre ĉe Mario ; eblas pisi per nenio (,,: Mian vazon (×: **se mi mortos havos vi**.)

'2 La kartludon ĉe ĉiela patro Dio ; ne ludeblas kartpartio

'3 Mian aŭton ĉar en la ĉiela stato ; ne troveblas aŭtostrato

'4 La edzinon kvereleman kaj plendaĉan ; sed en lito tute plaĉan

< Respondo de virinoj:>

'5 (×: (**Mian ulon se mi mortos havos vi**;)×) Li malbelas, ho domaĝe, ; sed li fikas tre sovaĝe. (×: **Mian ulon se mi mortos havos vi**.)

'6 Sed pro mia tro tenaco ; tuj rompiĝos lia kaco.....

'7 Li teruras pro mallerto ; sed en lit' alia sperto.....

'8 Li plej ofte nur timidus ; sed en fik' mi stelojn vidas.....

'9 Povas lante, fulme, daŭre ; ĝis la lito restas kaŭre.....

'10 Sed maltrafos vi la ĝuon ; ĉar mi finos lian prun.....)

& Konvena ĉapelo:

< Rekante 14 el 42 batoj por strofo, entute 294 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2016) per feroaj melodio kaj rekantaĵo tradukita de Flóvin Bænadiktsson.>

(#Melodio:

<:42> (# Flóvin Bænadiktsson:

/so so so so mi rere do mi;mi mi rere mi fafa la so; so so so so mi rere do mi;mi mi rere mi fafa la so;

(#Rekantaĵe: sofa mi re re; remi fa la so; sofa mi so o do lso))×7 +)

(&Strofoj:

'1 /Min kaptis sufoka kolero, ;
Ĉar mia edzino konfesis, ; Ke
ĝis la tutlasta monero; Por
robo ŝi ĉion elspezis!

(×:; **Lasu min dormi ; sur via
brako, riĉa jununjo2.)**

'2 De ŝvita monato la gajnon ;
Ŝi pro koketemo malŝparis ;
Kaj poste neniel nur ŝajnon ;
De penta pripento ŝi faris!

'3 Mi tial malfermis la kluzon
; De ĉiuj insultaj fivortoj, ;
Riproĉis al ŝila misuzon ; De
miaj laboraj virfortoj; –

'4 Responde ŝi kontraŭdisputis
; Ĵurante ĉe l' kruco de Kristo,
; Ke kontraŭ virin' mi konduktis
; Sen kor', kiel vir-egoisto!

'5 Kaj plue ŝi kriis laŭtplore, ;
Ke de nun ŝanĝiĝos l' afero, –
; Ŝi iros tuj for kaj samhore ;
Ŝi mortos sen mi, en rivero!

.....

'6 Kaj vere, ŝi tuje sin vestis;
Por iri kaj morti sen danko, ;
Sed jen, ŝi ekhaltis kaj restis ;
Senmove medita ĉe l' ŝranko

.....

'7 Mi tiam demande incitas: ;
"Do, ĉu vi ne iras, anĝelo??" ;
"Jes, tuj! – Mi nur iom hezitas,
; Ĉar mankas konvena
ĉapelo!"

.....)

& La ĝojoj de ekskurso:

< Rekante 25 el 49 batoj por strofo, entute 294 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2017) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:49> (i;do /mimi redo Ti So;Ti rere doTi La La;do mimi redo Ti So;Ti rere doTi La La;do mimi redo Ti So;Ti rere doTi La La

(#Rekantaĵe: mi domi somi re re;Ti do Lado mido TiLa Ti mi; mi domi somi re re;Ti do Lado mido TiLa Ti mi;Ti do Ti

)×6)+

(&Strofoj:

'1 /Sinjoro Piro iris ;
Dimanĉon frumatene ; Kun
Esperanta Grupo ; Ekskursi
esperplene, ; Ne havis tempon
manĝi, ; Li lupe malsatiĝis,

(×:; **Sed tamen nia Piro ;
Bonege ekskurse amuziĝis! ;
Pri tiu tago poste ; neniam li
kun amikoj ridis ;
Ekskurson.)**

'2 Post longa atendado ; La
vagonar' alvenis ; En kiu
pugnobate ; Starlokojn oni
prenis; Ŝvitige premegita ; Li
preskaŭ sufokiĝis,

'3 En vilaĝeton fine ; La
Grupo alveturis, ; Tuj la
malsataj homoj ; Al la gastejo
kuris, ; Ho ve, eĉ panpeceto ;
En ĝi ne plu troviĝis,

'4 La ekskursanoj poste ; Tra
la kampar' promenis, ; Subite
fulmotondro ; Per akvo ilin
benis, ; Senŝirme sub pluvego
; Nun ĉiuj akvumiĝis,

'5 Ĉar Piro dum diskuto ; Pri
"io" kontraŭdiris, ; Tuj oni
argumente ; Kravaton lian
ŝiris, ; Kaj el diskut' rezultis, ;
Ke... lia naz' sangiĝis,

'6 Vespere, kiam Piro ; Al sia
hejmo venis, ; Tuj lia edzinaĉo
; La balailon prenis, ; Frakasis
lian dorson ; Ĝis li
senkonsciiĝis,

& Vi resaniĝis!:

< Rekante 21 el 49 batoj por strofo, entute 294 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butikoj, 1931) kun dediĉo: Al mia bona amiko, Jan Kostecki. Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:49> (

/(La LaTi domi mire re; Ti Tido refa fami mi; do miTi do La;)×2

(#Rekantaĵe: mi (lala lala lala mi; re remi fala mi;)×2 do miTi do La)

)×5)+

(&Strofoj:

'1 /Mi ĵus konstatis, kara Jan, ;
Ke reprosperas via san' ;
Samkiel kverko; Sen febro
nun kaj sen kolik' ; Vi floras
kiel florbrasik ; En grasa
sterko!

(×:; **Se akvo fluas tra la gorgĥ'
; vi malsaniĝos tuj ; Estu
nepre via zorg' ; alkohol' en
la uj' ; se akvo fluas.)**

'2 Sed kio resanigis vin? ; Ĉu
talisman', ĉu medicin'? ; Ĉu
pentofaro? ; Ha, kia ŝerc', – mi
scias, ke ; Eĉ ne sukcesis
helpo de ; ..Veterinaro!

'3 Mi longe pensis pri la kaŭz'
; De via kontraŭviva naŭz' ;
Kaj min konvinkis ; La fakto,
ke vi febris nur, ; Ĉar peke
kontraŭ la natur' ; Vi.. akvon
trinkis!

'4 Ĉu vi memoras? – Jes, ĉe
mi ; Vi tiel tede petis pri ;
Freŝ-akva guto, ; Ke mi
konsentis pro la pac', ; Kaj vi..
ĝin trinkis sen grimac' ;
Samkiel bruto!

'5 Kunkulpa en la krima far' ;
Mi pente pensis pri ripar' ; De
ĉi blasfemo. ; Mi lavis ĝin per
ruĝa vin', ; Kaj tio ŝajne savis
vin ; De l' anatemo,

•
'6 Ĉar min trinkadis, kara Jan,
; Ĝis tia grad' je via san' ; Kaj
malpereo, ; Ke sufiĉegus ĝi
por re- ; ..laksigi regimenton
de ; La Sav-Armeo!

& Knabino sveda estis:

< Ripete 22 sed rekante 4 el 49 batoj por strofo, entute 295 paŝoj dum 4 minutoj. Norda Kantaro #4852. El sveda tradukis Kukoletto. Klarigoj (*): '1 Kva = kiu. '2 Kveŭ = kiam. '6 Ta = tiu.>

(#Melodio:

<:2,3> (o So /Sodo dodo /dolre mido /rere TiTi /dodo TiiSoSo /Sodo dodo /dolre mido /rere TiTi /do

(o;mi /faafa faafaso /la sofa /mimi domi /so fami /rere reeremi /fa mire /TiTi SoTi /do)×2

)×6)+

(&Strofoj:

'1 Kna/bino sveda /e2stis kva* /volis ege /edziniĝi, Kna/bino sveda /e2stis kva /volis al e/dziĝ'. (; Ŝi /havis koran so/piron, ĉu /hio hej, so/piron, kaj /tiel fortan de/ziron, ke /estu ŝi e/dzin'.)×2

'2 (× Kveŭ* ŝi unu jaron atendis, uluĉo venis jam, '1 ja ja,) (; Aspekto li (': malindis,) (×: ĉu /hio hej,) (: malindis,) la kruojn li eĉ vindis, terure bela ul'.)×

'3 (× Nur Dio scias kion patro pensis '1 kiam jesis lin, '2 per la jes'.) (; Kaj mi jen stultulino Okazis saĝofino: La ulon volis mi.)×

'4 (× Mi prenis lin pro la mono kaj pro mallonga viv', '1 ja viv'.) (; Mi pen[sis, ke] baldaŭ ĝin finas sed tiu rev' ruinas, jam dudek unua jar'.)×

'5 (× La ulo kuŝas je mia flanko kvazaŭ putra '1 trunko, × trunk'.) (; Li tudas kaj li kraĉas [pied]batas kaj gruntaĉas, min korpe ĝenas juk'.)×

'6 (× Ho, se ta* u[lo es]tus morta kaj kuŝus sur portil', '1 portil'.) (; citronon en la pugno pulvfunton en la pugo kaj eksplodigus mi!)×)

& Apologio de La Fontaine:

< Rekante 19 el 37 batoj por strofo, entute 296 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis La Fontaine (La leono kaj la paŝtisto). El franca tradukis (?) Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2016) per melodio kaj rekantaĵo Klarigoj (*): '6 Fedro, pragreke Φαίδρα, mita filino de la kreta reĝo Minoo kaj lia edzino Pazifao ; Ezopo, pragreke ΑΙΣΟΠΙΟΣ, mita sklavo kaj fablojn verkinto.>

(#Melodio:

<:> (La /LaLa dodo mi redo Tido reTi do La a;La LaLa dodo mi redo Tido reTi do La;

(#Rekantaĵe: do TiLa So SoSo Mi SiSi La; do TiLa So SoSo Mi Si La; do TiLa So So o))×8)+

(&Strofoj:

'1 La /fablo ja ne estas nur tio, kiel ŝajnas: ; Ni de l' plej simpla besto edifon tie gajnas.

(×: **Jen estas fabloj en longa seri'**. ; **Ilin aŭskultas kun ĝojo ni.** ; **Jen estas fabloj.**)

'2 La moralaĵo nuda — ĝi estas nur enuo. ; Perdiĝas tia fablo kune kun la instruo.

'3 Sed fabli nur por fabli — ŝajnas senvaloraĉe, ; samtempe oni devas instrui, ĉarmi plaĉe.

'4 Jen kiel, kun spirito spicita per gajeco, ; famuloj multaj verkis en tiu ĉi artspeco.

'5 Ornamoj, etendadon de diro ili evitas, ; vane perditajn vortojn ĉe ili ni ne vidas.

'6 Fedro* koncizas tiom, ke trafis lin riproĉo, ; Ezopo* eĉ pli multe ŝparegas pri la voĉo,

'7 sed unu grek' superas ĉi ambaŭ; li. tre vanta ; pri lakoneco eleganta,

'8 ĉiam nur en kvar versojn enfermas sian temon. ; Kiel? Prijuĝu spertaj, havantaj kritikemon.)

& Entombigo:

< Ripete 21 sed rekante 12 el 37 batoj por strofo, entute 296 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Wisława Szymborska (Vokado al Jetio, 1957). Tradukis Lidia Ligeza (Mi inventas la mondon, 2015). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:37> (

/do dodo mimi redo; mi mimi soso fami; fa fa lalala sofa; mi mi sososo fami;

(#Ripeto: do dodo mimi redo;)

(#Rekantaĵo: mi mimi soso fami; fa fafa lalala sofa; mi mimi soso fami;)

(#Ripeto: do dodo mimi redo;)

)×8)+

(& Strofoj:

'1 /Kranion oni elprenis, ;
metis ĝin en marmoron, ; lule
lule ordenoj ; sur kusena
purpuro. ; Kranion oni
elprenis. ; Dancu en ĉena ligo
; Dancu kun granda instigo ;
Dancu ĝis entombigo. ;
Kranion oni elprenis.

'2 (': Oni legis el paper') ; a –
estis li ul' honesta, ; bo –
domaĝe, li maleternas, ; co –
ekcludu orkestroj. (,: Oni legis
el paper'.)

(×: **Dancu en ĉena ligo ;
Dancu kun granda instigo ;
Dancu ĝis entombigo.**)

(,: Oni legis el paper'.)

'3 Kaj vi, popol', aprezu ; kaj
estimu ĉi pompon, ; ke
unufoja naskito ; povas havi
du tombojn.

'4 Ne mankis la parado ; por
tondraj muzikiloj ; polico por
l' amasoj, ; svingad' de
sonoriloj.

'5 La fuĝemaj okuloj ;
kontrolis, ĉu kolomboj ; de la
ter' al ĉielo ; flugas portante
bombojn.

'6 Inter popol' kaj ili ; nur
arboj devus esti, ; prisilento
kaj kantoj, ; tra la folioj nesti.
.....

'7 Sed tie baskulpontoj, ; tie
ravin' el ŝtonoj ; kun fund'
taŭga por tankoj, ; eĥ' por
venigi homojn.

'8 Plena je sia sango ; La
popol' paŝas espere, ; sen plu
vidi avertojn, ; nek sen koni
danĝeron.)

& Epigramoj:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 296 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butikoj, 1931). Baladigis Martin Strid (2017) per sama melodio kiel por Konfeso kaj simila rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:37> (/do dore doTi LaSo; do dore mimi mimi; milfa soso somi mire; dolre doTi LaLa LalSo;

(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; LaTi dodo dore mimi; mifa somi mire do; do mire do dodo Ti La a)

)×8)+

(&Strofoj:

,& Epigramo:

'1 /Aŭtoro aŭtentika, ; ne nur versfare lerta ; Se2d ankaŭ gramatike ; Sa2mkiel majstro certa,

(×:; **Zorgojn li foje forgesas ; Kritikantojn interesas ; Erareton faris li ; Zorgojn li foje forgesas.**)

'2 Publikis tiun frazon: ; "Min ĉiuj tre estimas, ; Ĉar mi en ĉiuj kazoj ; Perfekte min esprimas."

'3 Sed kelkajn ĵaluzulojn ; Ĉi tiu fraz' surprizis ; Kaj ili ĝin skrupule ; Ĝis fundo analizis.

'4 Ĝi – sub ilia knedo – ; Fandiĝis kiel vakso, ; Kaj sekvis la dekreto: ; "Eraro de.. sin-takso!"

,& Alia epigramo:

'5 Tre konata recenzisto ; Skribis foje en recenzon ; Saĝan frazon, kies sencon ; Fuŝkripligis la presisto.

'6 Tiu fraz' aperis jene: ; – (Aŭ almenaŭ proksimume, ; Ĉar mi citas nur resume ; Ne povante citi plene) –

'7 "Nun ankoraŭ tre modestas ; Niaj libroj kaj gazetoj, ; Ĉar l' original-poetoj ; Certe tro.. malmutaj estas."

'8 Kaj legant' ne kompreninte,
; Ke en tiu ĉi deklaro ; Kuŝas
dika preseraro, ; Diris grave:
"Bedaŭrinde!"

& La serĉanto de perdita spado:

< Rekante 27 el 53 batoj por strofo, entute 296 paŝoj dum 4 minutoj. Laŭ Ljuŝi Ĉunkiu. El ĉina tradukis S. J. Zee (El Popola Ĉinio, 61/2, p. 79). Baladigis Martin Strid (2016) per tradicia ĉina melodio kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,3:37> (/SOLA Do oRe Mi TISO LA DolRe Mi So; La MiFa Mi MiSo La aSo La ILAlMi Re elDo Re;

(#Rekantaĵo: Mi SO OLA TI MiSO LA Do; SoSo Lado Ti iiLalSo La; SoSo Lado Ti iSo Mi)

)×8)+

(& Strofoj:

'1 /Foje spado de iu vojaĝanto ; Falis en fluon de sur la boato.

(×: **Perdita spado en akvo ; Kiel li retrovu ĝin? ; Kiel li retrovu ĝin?**)

'2 Tuj signis li entrance sur la rando ; Por marki kie falis lia spado.

'3 Kiam ĉe l' bordo la boato haltis, ; Li senprokraste en riveron saltis

'4 De l' lok' signita por relevi ĝin ; El la ŝanĝema vasta akva sin'.

'5 Ĉion ĉi faris li kvazaŭ laŭplane. ; La rezultato? Kompreneble vane.

'6 Iuj kroĉiĝas dogme al doktrino, ; Aliaj faras ĉion laŭ rutino,

'7 Malsamaj tempo, loko kaj kondiĉoj ; Ne havas lokon en iliaj niĉoj.

'8 Kun sola vest' por ĉia ajn klimato, ; Ili forgesas ja la movon de boato.)

& La vulpo kaj la kapro:

< Rekante 21 el 37 aŭ 18 el 34 batoj por strofo, entute 272 aŭ 296 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per sama melodio kiel por "Konfeso" kaj simila rekantaĵo. Alternativaj melodio kaj rekantaĵo estas tiuj de Granda bovo.>

(#Melodioj:

(

(#Konfeso: <:37> a;do /dodo dore doTi LaaSo;So dodo dore mimi miimi;mi mifa soso somi miire;re dore doTi LaLa LaSo;

(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; La3La LaTi LaSo SoSo; SoSo SoSo LaSo do; do mire do dodo Ti La))

?

(# Granda bovo: <1,5:2> ;/LaaTi doTiLaSi /Lado mii;mi /soofa mire /TiTi re;re /doore miiredo /TiTiSi Mii;Mi /LaaTi doLa /SiilLa La;

(#Rekantaĵe: /LaaSiLa Ti; /dooTido refa /miidoTi La; /Laadore miimimi /soomire mi; /miidoTi La; /Tiidore mi /iSi SilLa /La a;))

)×7)+

(&Strofoj:

'1 En /puton falis, en ĝi sidis ;
la vulpo, laca jam plu salti, ;
subite ĝoje ĝi ekvidis ; ĉe l'
supra rando kapron halti.

(×:

(&Konfeso: **Zorgojn ĝi foje forgesas ; Tamen ĝoje ĝi sukcesas ; En la puto sidis ĝi ; Zorgojn ĝi foje forgesas.)**

?

(& Granda bovo: /**Turnas en tord'** ; /**ŝtrumpoj voleme /kurbas en kord'** ; /**Faros fripon' kiel /burĝa la ul'** ; /**mallarĝa pord'** ; /**rozajn ele- /ektu ru2/ĝajn.)**)

'2 Demandis tiu: "Kio okazis?
; Kial vi sidas en obskuro?" ;
"Nenio okazis" — ĝi emfazis
— ; "jen, vere, loko de
plezuro!

'3 Ĉi ombra freŝo estas rara ;
ĝuego, kiel balzamŝmiro ; la
akvo estas freŝa, klara, ;
saniga kiel eliksiro.

'4 Kaj dum vi en varmego tia ;
suferas de soif' kaj ŝvitas, ; mi
... ej! mi estas senenvia. ;
Ensaltu, kore mi invitas."

'5 La kapro saltis. Sen
prokrasto ; la ruza besto sin
eksvingis ; al ĝia dors', kaj per
vostkvasto ; velante, saltis plu,
atingis

'6 la supran randon de la puto,
; elgrimpis — kaj tre bone
fartis. ; Malsupre en konsterna
muto ; la povra kapro ĝin
rigardis.

'7 Kaj diris nun kun rid-rikano
; de supre la ruzul' fripona: ;
"Nu, do adiaŭ! Sed baptono, ;
vi estas barbe pli impona

'8 ol cerbe. Uzu jenan sperton:
; Ĉe la enir' al iu loko ; pri la
eliro havu certon." ; Kaj li
foriris post ĉi moko.)

& Laŭ vidpunkto de heliko:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 296 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butiko, 1931). Baladigis Martin Strid (2017) per sama melodio kiel por Interkona balado maĵore kaj simila rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:37> (#Maĵore:

a;do /dodo doTi dore mi;fa soso somi dodo doomi;mi remi reTi
SoTi re;mi dodo doTi dore mifa;

(#Rekantaĵe: mi mido LaLa Lado; mimi remi fami; rere reTi SoSo
SoTi; rere dore mire; doTi LaTi dore miSi La La)

)×8)+

(&Strofoj:

'1 Prin/tempo pulsas tra l'
ĝarden', ; Petolo tiklis la
naturon; En freŝa roso de l'
maten' ; Heliko flaris
aventuron..

(×: **Dankon! La lokon donu ;
dekstren en la ĉeno ; ke ni
ankaŭ tiun konu ; ĝojaj ĝis
reveno ; kaj aŭskultu ĉion
ĝis mateno.**)

'2 Precize.. ĉarma helikin' ;
Vekiĝis meze de legomo ; Kaj
scivoleme tiris sin ; Kokete el
la konka domo.

'3 Ĉu estas io sur la ter' ; Pli
bela, nobla, eleganta ; Ol tiu
helikin-aper'? ; (Almenaŭ por
helik' amanta?)

'4 Pli ol poeto la helik' ; Reteni
povas siajn sentojn, ; Li ne
deklame per lirik' ; Diskrias
ilin sur tegmentojn,

'5 Sed tamen kreskis pli kaj pli
; Nun lia kor' kaŭĉuk-elasta ;
Ĝis kiam lia dom' al li ; Subite
ŝajnis tro malvasta.

'6 Neeble nun akcepti ŝin ; Ĉe
li kun ama reciproko, ; Ĉar por
helik' kaj helikin' ; En unu
dom' ne estas loko!

'7 Kaj vi mensogis, ho poet', ;
Per tiu verso kaj deklaro, ;
Ke.. "plej malgranda kabanet' ;
Sufiĉas al amanta paro.."

'8 Kruela moko de l' destin', ;
Ke malgraŭ propra
konkkastelo ; Heliko nun kaj
helikin' ; Sin treni devis al..
hotelo!

& Libertempo:

< Rekante 23 el 37 batoj por strofo, entute 296 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butikoj, 1931). Baladigis Martin Strid (2017) per samaj melodio kiel por &Konfeso kaj simila rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:37> (/dodo dore doTi LaSo; dodo dore mimi mimi; mifa soso somi mire; dore doTi LaLa LaSo;

(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; La3La LaTi LaSo SoSo; SoSo SoSo LaSo do; do mire do dodo Ti La a)

)×8)+

(&Strofoj:

,& Unua:

'1 /Mara bordo kun hoteloj, ;
Pavilionoj kun terasoj, ; Kie
sur salikfoteloj ; Lacertumas
ĉiuj rasoj...

(×:; **Zorgojn mi foje forgesas**
; Mi pri peno ne promesas ;
kaj urĝemon venkis mi ;
Tion mi ĝoje konfesas.)

'2 Ŝajno, ŝajno, pantomimoj, ;
Nek senzorgo, nek ripozo! ;
Amelitaj modviktimoj, ; Via
paco estas... pozo!

'3 Ĉar monduma stulta kodo ;
Ankaŭ tie ĉi rigoras, ; Kaj la
sklavoj de la modo;
Libertempe nur... deĵoras

'4 Kaj kompatas min, barbaron
; Kiu ŝatas nur kamparon ; Sen
deviga kostumŝanĝo ; Post kaj
antaŭ ĉiu manĝo!

,& Dua:

'5 Ho benata nest' vilaĝa, ;
Nelekata de l' kulturo, ; Virga
ĉarmo, ĝoj' sovaĝa ; Hejmas
meze de l' naturo;

'6 Kaj neniu aŭtomato ; Negre
bruas en "dancingo", ; Nek
radio-aparato ; Kurzojn krias
de l' sterlingo!

'7 Pura estas ĉiu herbo, ;
Sanon portas ĉiu colo, ; Korpo
tie ĉi kaj cerbo ; Ĝuas pacon
de l' izolo... ..

•
'8 Mi sopiras nostalgie ; Al ĉi
tiu nesto, kie ; Kampa vivo kaj
ferioj ; Ne jam estas
"industrioj"!)

& Mia lingvo:

< Rekante 19 el 37 batoj por strofo, entute 296 paŝoj dum 3 minutoj. Verkis Nikolao Nekrasov (La Nova Epoko, N-ro 3, oktobro 1922). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,7:37> (/Mi MiMi LaTi doTi La;do TiMi MiMi MiFi SoSo; La LaTi LaSo SoFa Mi;Fa SoMi MiMi ReDo ReRe;

(#Rekantaĵe: Mi LaLa LaTi LaSo So; Mi MiMi MiFi SoSo; MiRe ReMi Do DoRe Mi; LaLa SoSo La La a)

)×8)+

(& Strofoj:

'1 /Ĉe sfero, kie vibras lim' ;
De homparolo ordinara, ;
Ekplantis mi en la anim' ; La
lingvon de spirit' homara.

(×: **Tretu kviete en la ĉen' ;
Paŝu en vigla vico ; Dume
kreskas verda arbar' ; kun
radikoj vastaj.**)

'2 Al mia slava patrolang' ; Mi
faris profundegan tranĉon ;
Kaj al trunket' en ruĝa sang' ;
Mi inokulis verdan branĉon.
.....

'3 Sed kiel plej natura hom' ;
Suĉinta el patrina mammo, - ; El
la sovaĝa idiom' ; Elkreskis
mia nova amo.

'4 El profundej' de loka hum' ;
Al la trunket' inokulita ; La
suko fluas, kiel rum' ; Kaj
fermentad' embri-incita.

'5 Ĝi fluas, verda tera suk' , ;
Fariĝas hele rozkolora ; Kaj
ekburĝonas ŝelveruk' ; Per
flor' mirinde dolĉodora.

'6 Klinite ie sur dekliv' ; Mi
kreskas ĉe naturkloakoj, ; Sed
vaste al tutmonda viv' ; Sin
tiras miaj branĉoj-brakoj.

'7 Per tiu mondoventa tuŝ' ;
Putriĝas mia homosenco ;
Grandega frukt' el mia buŝ' ;
Plimaturiĝas de komenco.

•
'8 Do floru lukse kaj sen tim' ;
Burĝonu malgraŭ la naturo, ;
Inokulita lingvanim' ; De l'
tuthomara vivkulturo.)

& Mia penso:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 296 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis L. L. Zamenhof (antaŭ 1887). Baladigis Martin Strid (2016) per sama melodio kiel por "Konfeso" kaj simila rekantaĵo.>

(#Melodioj:

<1,5:37> (/dodo dore doTi LaSo; dodo dore mimi mimi; mifa soso somi mire; dore doTi LaLa LaSo;

(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; LaTi dodo dore mimi; mifa somi mire do; do mire do dodo Ti La a;))×8)+

(&Strofoj:

'1 Sur la kampo for de l' mondo, ; antaŭ nokto de somero, ; amikino en la rondo ; kantas kanton pri l' espero.

(×: **Zorgojn li havis pri lingvo, ; Ĉu sukceson li atingos, ; Klara estis lia cel', ; Zorgojn li havis pri lingvo.**)

'2 Kaj pri vivo detruita ; ŝi rakontas kompatante, – ; mia vundo refrapita ; min doloras resangante.

'3 "Ĉu vi dormas? Ho, sinjoro, ; kial tia senmoveco? ; Ha, kredeble rememoro ; el la kara infaneco?"

'4 Kion diri? Ne ploranta ; povis esti parolado ; kun fraŭlino ripozanta ; post somera promenado!

'5 Mia penso kaj turmento, ; kaj doloroj kaj esperoj! ; Kiom de mi en silento ; al vi iris jam oferoj!

'6 Kion havis mi plej karan – ; la junecon – mi ploranta ; metis mem sur la altaron ; de la devo ordonanta!

'7 Fajron sentas mi interne, ; vivi ankaŭ mi deziras, – ; io pelas min eterne, ; se mi al gajuloj iras.

'8 Se ne plaĉas al la sorto ; mia peno kaj laboro – ; venu tuj al mi la morto, ; en espero – sen doloro!

& Sezonoj:

< Rekante 13 el 23 batoj por strofo, entute 299 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Miĥail Korotkov (Literatura konkurso Liro, Kaliningrad 2003). Baladigis Martin Strid (2017) per sveda melodio kaj nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<: 23> (a;La /Laamimi mido TiiTi;Ti rere miidodo Ti La;
dooLaLa SiiMiMi La;

(#Rekantaĵe: dooLaLa SiSi LaLa Ti; dooLaLa SiSi LaLa Ti;
reemimi mido Ti La)

)×20)+

(&Strofoj:

,& Primavera:

'1 La /suno varmigis ŝtonojn.
; El sub la neĝo trakreskis ;
flava malforta floret'.

(×:; **Turnas sin tuta la tera
jar'** ; **Falas fine la flora far'**
; **Turnas sin tuta jaro.**)

'2 Kiom da neĝo degelis! ; De
ĉiuj flankoj ĉirkaŭis la akvo ;
poplon sur insulet'.

'3 Bruas traktoroj tuttage. ;
Frugilegoj jam venis, ; ĉiuj
betuloj kun nestoj.

,& Somero:

'4 Tagmeza varmego. ; De
kie absint' ekodoris? ;
Preterkuris ventet'... ..

'5 Kvieta somera krepusko. ;
Aŭskultu! Sonorilet' – ; oni
pelas ĉevalojn.

'6 Stakoj sur flava kampo... ;
Sub saliko kuŝante mi ;
aŭskultas ĝojan kanton.

'7 Sub saliko kuŝante ; mi
aŭskultas ĝojan kanton ; de
lokustoj.

'8 La somer' proksimiĝas al
fin', ; l' aer' ne moviĝas. ;
Akacioj sonore krakas... ..

,& Aŭtuno:

'9 Rigardu, kiel la lag' ;
senakviĝis! Kvakas anasoj, ;
frua aŭtuno... ..

'10 Flava arbaro, ; paŝoj
rompas kvieton, ; l' aero estas
miela.

'11 Flava arbaro, ; Kio antaŭe
nigras? ; Arbara kabano... ..

'12 La suno varmigas ; la
teron malplenan. ; Acerbas
sovaĝaj pomoj... ..

'13 Aŭtuno. Malvarma nokto.
;

)

